

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Enderby:
"Ne nur de
riĉa loko al
riĉa loko"**



**Agi loke
en Japanio –
Agi fake
ekstertere**



**Ne-registaraj
Organizaĵoj:
Kreskanta influo**



Nova vento en nova jarmilo

Vi trovos

- 1 **Noujara mesaĝo**
Per paca armilo en nova jarmilo
Kep Enderby

- 2 **AL JARCENTO DE
NE-REGISTARAJ
ORGANIZAĴOJ**
Nadia Khouri-Dagher

**Granda rolo por
malgrandaj roluloj**
Candido Grzybowski



- 5 **Eksteraj rilatoj**
**UEA-kontribuo pli videbla
ĉe Unesko**
Laŭ Vincent Charlot

- 6 **Malferma Tago**
Laborplano kaj Lada tambureto

- 7 **Historio**
Al kiu Esperanto redonis la spiron
Kristo Dimitrov

- 8 **Reagoj**

- 9 **Navige tra TTT-paĝoj**

- 10 **Loka agado**
Per socia utilo al socia rekono
Harukuni EGAWA

- 11 **Faka agado**
Per Esperanto al la astroj
Johano Rapley

- 12 **Recenzoj**
**Miguel Fernández pri
verkoj de Trevor Steele**
*Petro Braŭn pri
verko de Miguel Fernández*



*Familio MacGill pri
La avo en la ĉareto*
*Marc Vanden Bempt pri
Historio de E-movado en Bjalistoko*

*Leif Nordenstorm pri
tri religiaj libroj*
*Raita Pyhälä pri
Okulo*

- 15 **Laste aperis**

Kaj plue...

- 16 **Fake**

- 17 **Loke**

- 18 **Persone
Oficiala Informilo**

- 19 **Foliume**

- 20 **Forpasoj**

La kovrilo:
Ventmuelejo en
Nederlando

Dekstre: Kep Enderby
klarigas punkton al
Humphrey Tonkin
(UEA / F. Veuthey)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establita kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32;
USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe
la Centra Oficejo de UEA. Unuopa
ekzemplero kostas € 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p.
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja
ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaksa: +31-10-436-1751.


Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zappelli.



PER PACA ARMILO EN NOVA JARMILO

Tiom UEA vastiĝis tra la mondo ke la tradicia novjara mesaĝo devus esti sendata plurajn fojojn tra la jaro. Multaj el niaj membroj festas la novan jaron nun — sed ekzistas ankaŭ multaj kiuj festos ĝin post kelkaj tagoj; aliaj, kiuj festos ĝin en marto aŭ septembro; aliaj, kiuj nun festas ne la novan jaron sed Ramadanon; kaj certe eĉ aliaj.

Ĉiukaze, pro respekto al la tradicio, ni restu ĉe la komenco de la kristana kalendaro.

Novjara mesaĝo estas okazo por pritaksi kun kritika distanco la evoluon dum la pasinta jaro kaj por esprimi dezirojn pri la evoluo en la posta jaro.

La Esperanto-movado dum la jaro 2000 daŭrigis sian kutiman kreskon. Ne lasu ke misgvidu vin la membro-nombro de ĉi tiu aŭ de aliaj organizaĵoj. En efektiveco, ĉi-momente Esperanto kreskas, foje eĉ tumulte, en regionoj kiuj ne eniras la “bon-kondutan” cirklon de la ok plej industriaj landoj en la mondo. Ekster tiuj ok landoj esperantistoj apenaŭ povas revii pagi kotizojn aŭ aĉeti librojn eldonatajn en la tradicie fortaj bazoj de la movado. Defio staras antaŭ UEA kaj la ceteraj organizaĵoj: ĉu ni sukcesos trovi manierojn enplekti tiujn homojn en la vivon de Esperantujo? Nia himno nenie asertas ke la flugiloj de facila vento devas porti la novan senton nur de riĉa loko al riĉa loko.

Se vi do vivas en lando kie ne estas problemoj pagi la kotizon de individua membro, bonvolu fari tion. Per tio vi helpas ĉiujn agadojn de UEA (de disvastigo de Esperanto inter la junularo aŭ en la Interreta mondo ĝis helpo al la movado en Afriko aŭ Nepalo). Jen kiel, fakte, oni elspezos la monon de via kotizo. Krome, vi aliĝos al la rondo de la esperantistoj plej bone informataj per la plej legata Esperanto-revuo, kaj vi estos inter la plej favorataj partoprenantoj de Universalaj Kongresoj, aĉetantoj de libroj kun rabatoj ktp.

Estas nun finiĝanta Kampanjo 2000, kiun sindediĉe sekvis la esperantistaro en multaj landoj. Ĝi portis kelkajn sukcesojn, dum ĉe iuj agad-flankoj progreso forestas. UEA, kiel reprezentanto de la monda esperantistaro, regajnis ĉiujn ŝanceliĝintajn poziciojn ĉe internaciaj organizaĵoj, kiel UN kaj Unesko kaj aliaj ankoraŭ, kaj ĝuste en la dua duono de la jaro 2000 atingis pliajn rezultojn. Esperantistoj estis petataj prelegi en Unesko mem al la tuta mondo de neregistaraj organizaĵoj. Neniu ridetis kaj neniu primokis, multaj eĉ petis rilati kun ni. Same okazas en UN, kie, danke al la refortigita Novjorka oficejo, oni komencas ricevi de pluraj flankoj subtenojn por la rezolucio de la Seula konferenco de NRO-j (1999), kiu postulas ke UN finfine alfrontu la problemon de lingvaj homaj rajtoj kaj la eblan solvon pere de neŭtrala lingvo. ☞ p. 4



Al jarcento de Ne-regist

Nadia Khouri-Dagher

En nia tempo, la nombro kaj influo de Ne-registaraj Organizaĵoj (NRO-j) ne ĉesas kreski. Ili fariĝis partneroj nemalhaveblaj por Unesko en la realigo de ties idealoj.

Pli kaj pli la internaciaj NRO-j influas la politikon de la ŝtatoj kaj de la internaciaj organizaĵoj — skribis lastatempe en la franca taggazeto *Les Échos* Thomas Risse, profesoro en la Eŭropa Universitato Instituto de Florenco. "Ili ne plu estas protest-movadoj junularaj, sed profesiularoj kies faksperteco fariĝis nemalhavebla."

Éric Denici kaj Gilles Somm rimarkigis en la franca revuo *Défense nationale* ("Nacia defendo"): "la homhela agado, kies antaŭa celo estis evolu-helpo, lastatempe iĝis peranto de ekonomiaj kaj kulturaj influoj".

NRO-j ne estas de hieraŭ

Nuntempe NRO-j ja ludas nepran rolon en evoluigo kaj homhela agado, sed ne regas konsento pri iliaj graveco kaj rajtigiteco. Kompreneble, NRO-j ne naskiĝis hieraŭ: la Internacia Komitato de Ruĝa Kruco estis fondita en 1863 kaj Nobel-premie distingita en 1901. (La saman premion ricevis Kuracistoj sen Limoj en 1999.) Sam-epoke, kristanaj

misiistoj larĝ-skale konstruadis lernejojn kaj sanigejojn en kolonioj. En 1946 eŭropanoj ricevis pakaĵojn de Usona Kooperativo por Helpsendaĵoj al Eŭropo (CARE).


Sed nur en la lastaj tempoj NRO-j eksplode multobliĝis: la nombro de NRO-j "internaciaj" (t.e. aktivaj en almenaŭ tri landoj kaj ĉerpantaj siajn rimedojn el pluraj landoj) kreskis de 176 en 1909 al 29 000 en 1993. En 1994, Oxford University Press taksis je 50 000 la nombron de NRO-j burĝonintaj surloke en la landoj de la "Sudo". Fakte, "ne eblas difini ilian ĝisdatan nombron, ĉar ĉiutage naskiĝas novaj" — klarigas Neda Ferrier, respondeca ĉe Unesko pri la rilatoj kun NRO-j.

La nomon NRO portas organizaĵoj plej diversaj: Ruĝa Kruco, tutmonde la plej granda kun siaj 105 milionoj da membroj kaj jare po 230 milionoj da helpatoj; internaciaj NRO-j kiuj premgrupe agas pri unu cel-temo, kiel Greenpeace (2,7 milionoj da membroj) pri la medio, Amnestio Internacia (pli ol miliono da membroj) pri homaj rajtoj, Handikapo Internacia pri tret-minoj, aŭ Savu la Infanojn; lokaj NRO-j je la servo de unu vilaĝo aŭ kvartalo, kaj grandnombraj fakaj asocioj, federacioj kaj sindikatoj (ekzemple virinaj aŭ ĵurnalistaj) je loka, nacia kaj internacia niveloj.


Fundamenta rol-ŝanĝo

"De longe NRO-j plenumas servojn en la kampoj de eduko kaj sano, sed ĝis nun tio okazis malpli laŭ koheraj celoj ol por ŝtopi breĉojn, ĉar afrikaj kaj aziaj registaroj malhavis rimedojn por starigi servosistemojn por ĉiuj" — rimarkigis en 1996 Michael Edwards (Savu la Infanojn) kaj David Hulme (Universitato de Manĉestro) en la revuo *World*

Frapaj malegalecoj inter riĉaj kaj malriĉaj ĉe globaj ŝancoj (en 1997)



araj Organizaĵoj



The Unesco Courier

Development. "Nuntempe jam konstateblas prefero por NRO-j kiel certigantoj de sociala prizorgo, kaj tio estas fundamenta ŝanĝo." Krome, hodiaŭ Interreto ebligas al ili ĉiuj interkomuniki kaj eĉ kunordigi sin kiel movadon.

Ne estas hazardo ke la NRO-j tiom disvolviĝis ĝuste ekde la jaroj 80-aj, "jardeko perdita" rilate evoluigon, laŭ la Monda Banko. Pro la struktur-alĝustigaj programoj truditaj al diversaj landoj ties sociala buĝeto reduktiĝis, dum la liber-merkata ekonomia politiko en multaj mondo-partoj kreskigis malriĉecon kaj socian marĝenigon. En tiuj cirkonstancoj la NRO-j aperis — laŭ la vortoj de Jacques Bugnicourt, estro de NRO nomata ENDA (Senegalio) — kiel "organizaĵoj kun minimuma strukturo, kapablaj liveri sociajn servojn je malalta kosto".

En la sama jardeko disvastiĝis la koncepto de daŭripova, hom-centra kaj integra evoluo, kiu celas plibonigi la vivkvaliton de lokanoj kun ties aktiva partopreno. Pli kaj pli ofte registaroj kaj internaciaj organizaĵoj kunlaboris kun lokaj NRO-j en projektoj kiel urba rubo-kolektado aŭ fosado de vilaĝa puto. En 1981 la Monda Banko vortumis "noton pri la sekvenda politiko", kiu pledas por kunlaboro kun NRO-j en siaj projektoj.

"La voĉo de la homoj"

Je la internacia nivelo, NRO-j de tiam pli kaj pli videble aktivas, flanke al naciaj registaroj, en internaciaj UN-konferencoj, aŭdigante "la voĉon de la homoj" pri brule urĝaj diskuttemoj de nia tempo. En konferencoj pri virinoj (Meksikurbo, 1975; Nairobi, 1985; Pekino, 1995), pri demografiaj problemoj (Kairo, 1994) kaj pri la medio (Rio-de-Ĵaneiro, 1992) la postuloj de NRO-j influis la finajn dokumentojn internacie akceptitajn. La atmosfera poluo, la ŝrumpo de la ozontavolo, la mutilado de virinaj seks-organoj, la prostituado de infanoj: jen kelkaj el la sentabuligitaj temoj pri kiuj NRO-j sukcesis atentigi la mondon, foje eĉ instigante kontraŭkampanjojn.

Kio do klarigas la lastatempajn kritikojn kaj dubojn pri ĉi tiuj ĝenerale aprobatataj organizaĵoj de la "civitana socio"? "La NRO-j pretendas pli bone scii kio plej konvenas por la publika bono" — grumblis Václav Klaus, kiam li

Granda rolo por malgrandaj roluloj

Candido Grzybowski - Brazilo

NRO-j, tutmondaj, naci-skalaj aŭ lokaj, ne celas konkerti potencon aŭ gajni elektojn. Ni ne estas organizitaj kiel politikaj partioj, kvankam nia agado estas publika kaj aperas kiel forte politika. Ni eĉ ne povas prezentiĝi kiel reprezentantoj de la civitana socio, ĉar ĝi ne donis al ni tian mandaton.

Kion do ni volas? Atingi homojn, agigi, eduki, komprenigi, proponi, novigi, konvinki, kaj politike fortigi diversajn grupojn de la civitana socio, aparte tiujn ekskluditajn el la decid-procezoj. Ni volas doni voĉon al ideoj kaj valoroj, demandoj kaj proponoj pri socia justeco, pli justa distribuo de riĉaĵoj, respekto de la medio, batalo kontraŭ malriĉeco kaj socia ekskludo.

Kiuj ni estas? Malgrandaj roluloj, en komparo kun aliaj pilieroj de la

civitana socio, kiel sindikatoj kaj fakaj organizaĵoj, ŝtataj kaj merkataj establoj. Sed samtempe ni estas ankaŭ "grandaj" roluloj, ĉar niaj celoj kaj agadkampoj ne agnoskas limojn laŭ unuopaj socioj, naciaj ekonomioj aŭ registaroj. Nia tasko estas ponti inter la loka kaj la tutmonda: alivorte, ni okupiĝas pri universalaj komunaĵoj al la tuta homaro. Homaj rajtoj, sociaj krizoj, medi-protektado estas tutmondaj temoj. Ni alfrontas ilin en konkretaj situacioj, sed ĉiam en monda perspektivo.

Kio donas pravigon al nia agado? La kvalito de la valoroj, principoj kaj idealoj kiujn ni defendas; la graveco kaj aktualeco de la temoj kiujn ni levas; la originaleco de la proponoj kiujn ni alportas. La sola fonto de nia pravo estas nia kapablo krei ideojn cele al agado — ideojn kiuj atingas la alton de la civitana devo al kies plenumo ni aspiras.

Parto de artikolo el Le Courier de l'Unesco, sep. 2000

Tradukis, el la angla kaj franca, István Ertl

estis ĉefministro de Ĉeĥio. “Ĉu la NRO-j vere reprezentas la popol-amasojn?” — demandis Pranay Gupte, ĉefredaktoro de la dumonata Novjorka revuo *The Earth Times*.

“Malgraŭ propra difino, ili ofte tute ne estas neregistaraĵ” — skribis en januaro 2000 la brita semajngazeto *The Economist* —, “se konsideri la monsubtenon kiun ili ricevas de registaroj kaj de internaciaj organizaĵoj”.

Kiel observas multaj fakuloj, Afriko ricevas pli da po-kapa NRO-helpo ol kiu ajn alia kontinento — kaj tamen malbone fartas. Ĉu do NRO-j taŭgas nur por ŝtopi breĉojn kaj pansi vundojn? Tio ne sufiĉas por eliri el la diabla cirklo de mis-evoluo.

Ideologiaj motivoj

“La NRO-j ne konsentas kiel agadi pri sano” — donas ekzemplon Rony Brauman, antaŭa estro de Kuracistoj Sen Limoj. “Ĉu pli bone konstrui pli da malsanulejoj, aŭ premi la registarojn ke ili traktu tion kiel sian respondecon?” Registaroj emas konsideri NRO-subvenciadon kvazaŭ aprob-signalon ke ili mem povas ne zorgi pri la sociala sektoro. “Fone de la subteno al NRO-j kuŝas grandparte ideologiaj motivoj, malpli ia praktika konsidero pri bezonoj” — skribas Michael Edwards kaj David Hulme.



Catherine Beuvin, el UNESCO Sources

Estas tamen sendube ke la NRO-j “atingis ke la ĉefa kriterio de internaciaj agadoj estu la vivkvalito de la homoj” — emfazas Ramesh Thakur, la vic-rektoro de la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj. Aldone, Interreto pli vastigis ilian agadgamon. Precipe la sukceso de la NRO-j mobilizi hom-amasojn novembre de 1999 en Seattle kontraŭ la Mondkomerca Organizaĵo kaj aprile de 2000 en Vaŝingtono kontraŭ Internacia Mona Fonduso montris al la tuta mondo ke NRO-j estas la sola internacie organizita forto kiu kontestas tutmondigon konceptatan kiel nura libermerkata idearo. “Komercon honestan, ne komercon liberan” — skandis la manifestaciintoj.

La NRO-kampanjoj kontraŭ hormona bov-viando, infana laboro, genetike modifitaj plantoj aŭ kultura hegemonio ĝuas publikan subtenon en landoj nordaj kaj sudaj. NRO-j diskrete batalas de dudek, tridek aŭ cent jaroj por la homa digno. Ili nun atingis tian grandecon kaj tian pezon ke ilia voĉo fariĝas aŭdebla multe trans la limoj de aktivulaj rondoj, markante eble la komencon de movado tutmondana.

(UNESCO Sources, junio 2000)

Tradukis, el la angla kaj franca, István Ertl

Daŭrigo de p. 1

En ĉiuj kontinentoj esperantistoj komencas funkciigi ĉiam pli sukcese siajn kontinentajn aŭ landarajn Esperanto-asociojn, -uniojn kaj -komisionojn. Mi ne povas ne citi la amerikajn kaj aziajn kongresojn, kiel brilajn ekzemplojn de tio kion oni faras. Mi ne povas ne menci la revigliĝon de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu eble siavice revigliĝos kelkajn “Esperanto-agade” marĝenajn eŭropajn landojn. Mi certas ke eŭropaj e-istoj kapablos ĝis maksimumo ekspluati la eblojn kiujn prezentas la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001, por montri al la mondo, kiu vere volas subteni plurlingvecon kaj sekurigi la pluekziston de naciaj lingvoj.

Apud la tradiciaj rimedoj por Esperanto-agado pli kaj pli ekspansias io nova: Interreto. Estas vere mirinde konstati kiel rapide esperantistoj sukcesis adaptiĝi al ĉi tiu moderna komunik-rimedo kaj utiligi ĝin por Esperanto. Tiu kampo certe prezentas al ni multajn eblojn (mi ne kaŝu de vi ke multaj novaj esperantistoj en multaj malnovaj landoj varbiĝas pere de Interretaj kursoj). UEA kaj la ceteraj organizaĵoj devus iom pli kuraĝe plonĝi en ĉi tiun maregon, kie oni trovas amason da junaj kaj interesaj homoj. Ĝuste tiajn homojn ni bezonas.

Ĉar ni parolas pri junaj homoj, estas oportune menci la labor-streĉojn de nia junulara sekcio TEJO, kiu rekomencas produkti novajn ideojn kaj novajn sukcesajn agadojn. Mi apelacias al ĉiuj legantoj de ĉi tiu mesaĝo, junaj kaj maljunaj, ke ili klopodu superi organizajn kaj aĝajn limojn kaj antaŭenigi kunlaboron. Ĉiu plia novjara mesaĝo fakte portas nin pli proksimen al la momento kiam la TEJO-homoj devos transpreni la torĉon (kaj mem verki siajn novjarajn mesaĝojn).

Same mi petas ĉies kunlaboron por ILEI, nia instruista brako. Apenaŭ necesas diri ke kie oni ne instruas Esperanton, oni ne kreas esperantistojn. Instruado havas fortan lokon en la nun diskutata nova Laborplano de UEA.

Mi ne povas fini ĉi tiun mesaĝon sen du lastaj konsideroj.

Niaj fakaj asocioj devas fortiĝi, por apliki Esperanton en la praktiko. Nur kiam Esperanto estos lingvo per kiu oni povas aĉeti kamionon en Eŭropo kaj sendi ĝin al Afriko, tiam Esperanto komencos esti vere normale internacia lingvo. Mi parolis pri kamionoj kaj komercado, sed ne estas malsame pri spiritaĵoj kaj kulturaj varoj.

Kiel ĉiam okazis en la pasinteco, ekzistas fortoj en la mondo kiuj postulas rezigni je demokratio favore al ekonomia efikeco. Ne estas strange ke tiujn ideojn subtenas ĉefe tiuj kiuj estas (aŭ esperas esti) ekonomie fortaj. Ni apartenas, laŭ mi, al la alia flanko, al tiuj kiuj postulas ke la homo estu en la centro de la atento, kiuj pensas ke ekonomia evoluo havas sencon nur se ĝi plifeliĉigas, ne se ĝi mortigas la homon per malsanoj aŭ detruante lian mondon.

Ni postulas ke ankaŭ en la lingva kaj kultura kampo estu demokratio, ke neniu humiliĝu kaj submetiĝu. Tion ni diru laŭte kaj klare en ĉiuj forumoj en kiuj ni havos la eblon paroli dum la venonta jaro. Interne de la movado, ĉiuj bonvolu partopreni la diskutojn pri la Laborplano, kies slogana resumo estas ĝuste: “Al lingva demokratio!”

Bondezirojn al vi kaj al Esperanto en la jaro 2001-a.

Kep Enderby

UEA-kontribuo pli videbla ĉe Unesko

Pli ol 130 neregistaraj organizaĵoj (NRO-j) partoprenis en kolokvo titolita "Kulturo de paco: aganta ideo" (24-25 nov., Parizo).

La kolokvo okazis en la domo de Unesko kaj estis organizita de la NRO-Ligokomitato de Unesko por revui la agadon de la tutmonda movado por kulturo de paco kaj neperforto. Tiu movado estis lanĉita komence de 2000, Internacia Jaro por la Kulturo de Paco.

Krom bilanci la agadon de NRO-j kaj la atingitajn rezultojn dum la Jaro, la kolokvo diskutis ankaŭ kiel plifortikigi kunlaboron inter NRO-j kaj Unesko sojle de la Internacia Jardeko por Kulturo de Paco kaj Neperforto por la Infanoj de la Mondo (2001-2010). La kolokvo laboris en plenkunsidoj kaj en ok atelieroj, laŭ la ok temoj de la UN-agadprogramo pri kulturo de paco.

Malfermante la kolokvon, la ĝenerala direktoro de Unesko, Koichiro Matsuura, ĝojis pri la sukceso de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco, dum kiu NRO-j mobiliziĝis por disvastigi Manifeston 2000 iniciatitan de Nobel-premiitoj pri paco. Matsuura aldonis: "Hodiaŭ, unu monaton antaŭ la fino de tiu jaro, ni povas aserti ke la alvoko estis aŭdita: 72 milionoj da subskribintoj — pli ol centono de la monda loĝantaro — jam aliĝis al Manifesto 2000."

Tri junuloj intervenis: koreino, alĝeriano kaj franco, reprezentantaj la Fondaĵon Alvoko de Nobel-premiitoj pri Paco por Infanoj. Ili atentigis la partoprenantojn pri riskoj de la tutmondiĝo kaj petis fini ekonomian militon kiu mortigas multajn infanojn. Ili konkludis: "Perforto ne funkcias!"

UEA kaj ILEI estis oficiale reprezentitaj de Vincent Charlot kaj René Triolle, kiuj partoprenis en kvar el la ok atelieroj. Al tiu pri la temo "Sub-

teni plenvvaloran komunikadon kaj liberan cirkuladon de informoj kaj scioj", UEA estis invitita kontribui per prelego. Philippe Berizzi kaj Karine Berizzi-Textier faris la prelegon, por kies preparado oni starigis retgrupon antaŭ la kolokvo. Alian prelegon liveris Internacia Katolika Asocio por Radio kaj Televido (UNDA). La lingvo de la ateliero estis la franca kaj en ĝi partoprenis 24 reprezentantoj el 14 NRO-j.

La prelego de Karine kaj Philippe Berizzi montris profesian kvaliton kaj vekis intereson de la publiko. La fina raporto de la grupo elstarigis kiel ĝiajn specifajn kontribuojn la nocion de lingva malegaleco, la deziron esti komprenita kaj la rifuzon ignori aliulon. La raportistino aparte menciis la reton de UEA, precipe la Interretan, kaj la komunan lingvon kiel kontribuantojn al respekto de aliuloj kaj al "interŝanĝo kaj dialogo".

La dua tago konsistis el du grandaj partoj: prezentado de la rezultoj de la atelierlaboro kaj debato pri la agadplano por la Jardeko: "Kiel mobilizi la tutan NRO-komunumon?"

Tre produktivaj, la ok atelieroj ebligis starigi konkludojn kaj precizajn rekomendojn. Monique Fouilhoux, prezidantino de la NRO-Ligokomitato de Unesko, resumis ilin ĉirkaŭ tri ĉefaj aksoj: la necesoj informi, formi kaj fine dialogi. Pri tiu lasta ŝi indikis ke la neceso dialogi kaj interŝanĝi implikas "partoprenigi ĉiun kaj redukti la lingvan malegalecon".

Post la kolokvo, UEA aliĝis al retforumo pri "Tutmonda movado por kulturo de paco kaj neperforto".

Laŭ raporto de Vincent Charlot

TUTJARA MEMBROKUNVENO

Por ebligi al pli da membroj kundiskuti pri la nova Laborplano de UEA, naskiĝis la ideo virtuale vastigi al la tuta jaro la tradiciajn kunvenojn okazantajn dum la UK, kiam membroj de UEA starigas demandojn al la Estraro.

Tiel ekestis la listo indivduaj-membroj@egroups.com, per kiu la individuaj UEA-membroj povos, same kiel dum tiuj kunvenoj, diskuti pri ĉiuj aspektoj de la UEA-agado.

Se vi estas individua membro de UEA (la informo estos kontrolita), vi rajtas aliĝi ĉe reto@uea.org, menciante vian nomon kaj vian UEA-kodon aŭ poŝtadreson.

La liston daŭre atentos almenaŭ unu estrarano de UEA (komence, ĝen. sek. Michela Lipari), kiu respondos kolektive ĉiun duan semajnon, krom pri escepte gravaj temoj.

Validas la reguloj:

- mallongaj mesaĝoj;
- malpermeso pri personaj insultoj;
- respekto al la Statuto de UEA rilate la pritraktatajn temojn.

DUMVIVA MEMBRIĜO: NOVA REKORDO

En 1999 UEA ricevis 21 novajn dumvivajn membrojn (DM), dum ilia nombro en 1998 estis nur 13. En 2000 dumviva membriĝo iĝis eĉ pli populara: ĝis 17 dec. aliĝis 30 novaj DM. De post 1976, kiam la dumviva kotizo estis fiksita je 25-oblo de la kotizo de Membro-Abonanto, neniam aliĝis tiom da dumvivaj membroj.

Germanio liveris 5 DM; Japanio kaj Usono po 4; Britio kaj Francio po 3; Brazilo 2, Aŭstralio, Bulgario, Ĉinio, Hispanio, Korea Resp., Luksemburgio, Nederlando, Pollando kaj Vjetnamio po 1. 20 aliĝintoj estas viroj, 10 virinoj. La plej juna naskiĝis en 1984, la plej aĝa en 1921. Ok novaj DM neniam antaŭe membris en UEA, sed tuj aliĝis dumvive.

La 17-an de dec. 2000 UEA havis entute 896 dumvivajn membrojn.

 **Estas tempo rekotizi por 2001!**

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. Antaŭdankon!

LABORPLANO KAJ LADA TAMBURETO

Jam por la 13-a fojo pleniĝis de vizitantoj la sidejo de UEA en Roterdamo dum la Malferma Tago sabaton, la 25-an de novembro.

Entute 110 gastoj el 12 landoj povis ĝui programon kiu fariĝis pli riĉa ol antaŭanoncite.


Spomenka Štimec estis la ĉefgasto, unu el la plej elstaraj nuntempaj E-aŭtoroj, kiu dufoje prelegis pri sia verkista aktivado kaj aŭtografis siajn librojn. Ĉar ŝi estas sekretario de la LKK



Salonpleno da atentemuloj aŭskultis Spomenkan Štimec.



Brokantaĵa bazareto. Dekstre: I. Ertl, S. Štimec, T. Chmielik kun *La lada tambureto*.



de la 86-a UK, ŝi ankaŭ donis freŝajn informojn pri la kongresaj preparoj.

La librokulturan funkcion de la Malferma Tago plie emfazis la lanĉo de la

E-eldono de *La lada tambureto* de la Nobel-premiito Günter Grass. Ĉeestis kaj la tradukinto Tomasz Chmielik, kiu prezentis ĝin, kaj la eldoninto Georgo

Handzlik, kiu regalis la publikon ankaŭ per trobadora koncerto.

En la plenŝtopita Biblioteko Hodler, en kiu oni cetere projekciis E-filmojn, Renato Corsetti, vicprezidanto de UEA, prelegis pri la nun preparata Laborplano de UEA.

Por la libroservo de UEA la tago estis aparte laboriga. Libroj kaj aliaj varoj vendiĝis je la suma valoro de € 4249,65 (9365 gld.): la dua plej bona rezulto en la serio de Malfermaj Tagoj. Pleje furoris murkalendaro dediĉita al la Zagreba UK (28 ekz.), la romano de Grass (16) kaj nederlanda E-gramatiko (13). ★

Interkonsiliĝo pri E-agado en Eŭropo

Laŭ invito de UEA, dekkvino da elstaraj agantoj por Esperanto en Eŭropo, precipe ĉe la instancoj de Eŭropa Unio, kunvenis en Roterdamo la 25-an kaj 26-an de novembro por klopodi kunordigi la plurajn iniciatojn kiuj okazas en ĉi tiu kampo.

La ĉefaj preparolitaj temoj estis la agado de Eŭropa Esperanto-Unio, la agado de la Laborgrupo pri la Lingva Problemo en EU (tute aparte la projekto NEIGHBOUR), la partopreno de e-istoj en la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001, kaj ebla starigo de Esperanto-oficejo en Bruselo.

Multaj ideoj kaj agad-direktoj estis funde analizitaj. Tio helpis ekkompreni la celojn de la malsamaj agantoj, kio estas nepre kondiĉo por kunordigi kaj subteni unu la aliajn, anstataŭ lanĉi al eŭropaj esperantistoj kontraŭdirajn mesaĝojn kaj iniciatojn.

La planoj por la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001 antaŭeniras relative kontentige. La esperantistaro ricevos baldaŭ pliajn informojn pri ĝi per apartaj komunikoj.

La projekto NEIGHBOUR de la Brusela laborgrupo estas nun en reripensa fazo. Ĝi akiras trajtojn de scienca projekto, kies realigado devos esti en la manoj de ne-esperantistaj sciencistoj kaj de la eŭropaj instancoj.

Komenciĝis la esplorado de la ebloj trovi en Bruselo taŭgan ejon kaj precipe taŭgan deĵoranton por oficejo, kies labor-enhavo restas ankoraŭ pli precize difinenda.

Pri Eŭropa Esperanto-Unio estis prezentitaj ideoj por doni al ĝi pli da forto en la kampoj de reprezenteco de la eŭropaj esperantistoj, firma kunligo kun la landaj asocioj en EU kaj agad-kapablo ĝenerale.

Ĉiuj diskutitaj ideoj trovos konkretigon en la venonta periodo, tiel ke oni povas rigardi al la jusa kunveno kiel al promesplena etapo sur la vojo al pli efika agado por Esperanto en Eŭropo. La kunveno rekonfirmis la utilon de konsultiĝoj pri specifaj laborkampoj kaj la oportunecon okazigi tiajn lige kun la Malferma Tago de la CO. Unuafoje oni spertis tion en novembro 1999, kiam UEA invitis al simila kunsido lingvopolitikajn fakulojn.

Al kiu Esperanto redonis la spiron

Kristo Dimitrov · Bulgario

Ni ofte ricevas, sed nur malofte povas aperigi, interesajn vivrakontojn esperantistajn. Jen, sojle al nova jarmilo, vivhistorio el la 20-a jarcento.

Estis la jaro 1942. Mi aĝis tiam 12 jarojn. Unu matenon dum malfrua nebula aŭtuno mi eliris el la kort-pordo de nia domo, voje al la lernejo. Subite mi rimarkis policiston sur blanka ĉevalo kaj maljunan piediranton antaŭ li, kiu lace trenadis la piedojn. La policisto demandis: "En kiu domo loĝas Dimitri Petkov?" Tiel nomiĝis mia patro. Mi ekkriis: "Paĉjo, oni vin serĉas." Al mia patro la policisto ordonis: "Vi estas Dimitri Petkov, ĉu ne? Vi devas subskribi tiun ĉi papon kaj pagi la indikitan sumon por la transporto kaj venigo de tiu ĉi homo." Tiam aperis mia avino Dena. Kiam ŝi ekvidis la kadukan maljunulon, ŝi akre kriis: "Kie vi estis dum tiom da jaroj, kiom vi gajnis kaj kial vi nun revenas?" Estis ŝia edzo, forlasinta Bulgaron en 1908, kiam mia patro estis kelkmonata bebo: li laboris kiel legomĝardenisto en Rusio 34 jarojn sen anonco kaj sen reveno duma. Mia patro pagis al la policisto kaj estime kisis la manon de sia patro, kiun li vidis la unuan fojon en sia vivo. La postan jaron mia avo mortis pro kancero, prononcinte eĉ ne unu vorton antaŭ ni. Laŭ mia avino li tamen diris: se la reĝimo en Bulgario estos kiel en Rusio ekde 1917, ĉiuj fariĝos mutaj.

Jaron poste, en 1943-44, ja stariĝis komunista reĝimo en Bulgario. Malgraŭe, mi eniris kiel regula lernanto pastran seminarion en Sofio. En la tria jaro mi tamen devis interrompi mian studadon pro manko de mono, post kiam mia patro vendis sian lastan greneton por pagi la lernejan kotizon.

Libro tuj legebla

Dum unu somerferia tago mi revenis de Sofio al mia hejmo en Gorica. Mia patrino diris al mi ke mia plej bona amiko Petro malsaniĝis. Vizitante lin en hospitalo, mi ekvidis libron: "Kurso de Esperanto". Neniam aŭdinte pri tio, mi tuj prenis la libron kaj eklegis ĝin. Petro miris pri mia kapablo tuj

traduki. Sed mi ja longe studadis en la seminario la latinan, grekan, francan,



La unua Esperanto-kurso de nia aŭtoro en lia naskiĝvilaĝo, Gorica-Popovsko

italan, tiel ke ĉio estis komprenebla. Mi tuj mendis la lernolibron kaj help-materialojn el Sofio, ankaŭ Esperantan insignon. Unu tagon, kiam mi veturis en trajno, la konduktoro ekparolis al mi rapide en Esperanto, tiel glate kaj flue ke mi konfuziĝis. Li klarigis ke baldaŭ okazos en Sofio bulgara Esperanto-kongreso, en junio 1956.

Mi tuj aliĝis al mia unua kongreso, kvazaŭ Esperanta baptito. Venis ne multe da kongresanoj, sed inter ili estis Ivo Borovečki kun siaj studentoj el Zagrebo. Mirigis min la altkvalita prononcado de d-ro Borovečki, kaj mi ĉiam restis lia arda adepto.

Flugadis la jaroj. Finstudinte en la pastra seminario en 1951, mi specialiĝis en Alta Pedagogia Instituto pri franca filologio. Dume en mia luita loĝejo mi organizadis multajn Esperanto-kursojn por studentoj, kaŝe pro la severeco de la stalinisma reĝimo.

Sanigo el Hispanio

Fine de mia studado, mi subite peze malsaniĝis je pulma tuberkulozo, kaj oni sendis min al sanatorio por operacio, en kiu oni forprenis kvin aŭ ses ripojn. Duono de la operacioj mortis sur la kirurgiaj tabloj, aliaj kripliĝis. Pri tio mi skribis al mia intima Esperanta korespondantino, f-ino Mercedes Audina Claver, flegistino en la urbo Manresa en Hispanio. Ŝi tuj zorgis pri

mi, sendante al la sanatorio grandan pakadon da efikaj medikamentoj. Oni kuracis min pere de tiuj medikamentoj, kaj mi resaniĝadis de tago al tago. Post trimonata kuracado, mi eliris el la sanatorio tute sana, dank' al Esperanto kaj Mercedes. Mi nun estas ĝisvivinta 70 jarojn, kaj bedaŭrinde ankoraŭ ne povis ŝin danki.

Mi edziĝis en 1967 al Nadia, ankaŭ esperantisto. Nia unua infano, Dimitri, estis baptita en 1969 de Viena e-isto, d-ro prof. Ernst Görlich, kaj nia filino Vania ricevis bapton de la franca esperantistino Jannine Despinay, en 1971.

Sekvis prelegvojaĝoj, Esperantaj kongresoj, kursgvidado... kaj la lasta Esperanta evento, Ekumena Esperanto-Kongreso en Gliwice (Pollando), antaŭ nelonge. Neniam mi estis altnivela funkciulo, nur nerimarkinda ero digna por la Zamenhofa modesteco. ★

Reagoj



La kontribuoj aperantaj en ĉi tiu rubriko esprimas la opinion de siaj aŭtoroj, kaj la redakcio ne respondecas pri ili.

Tutmondiĝo: Onia profito

La slogano “Tutmondiĝo: labori angle” (nov., p. 188) estas erara. Mi pruvos tion per simpla matematiko.

Por ellerni Esperanton oni bezonas *e* horojn. Por lerni la anglan ne-anglo devas studi *a* horojn; denaska anglo-parolanto ne bezonas kromajn studhorojn.

En la monda komerco laboras *K* homoj. Frakcio da ili estas denaskaj angloj, ni diru 0,2 (20%) — verŝajne supertakso.

Kio estas pli profita en la komerco: enkonduki kiel laborlingvon la anglan aŭ Esperanton? Rigardu la sekvan komparon pri la monde bezonata tempo por ellerni E-on aŭ la anglan. Ĉu *K* oble *e* (en kazo de E-o) plias al, egalas al aŭ malplias al *K* oble $(1 - 0,2)$ oble *a* (en kazo de la angla)? Pli koncize skribite: $K e \Leftrightarrow K (1 - 0,2) a$. Tiu ĉi komparo restas la sama se ni dividas ambaŭ membrojn per *K*: $e \Leftrightarrow (1 - 0,2) a$. Oni nun vidas ke la rezulto nur dependas de la proporcio inter *e* kaj *a*.

Eksperimente oni studis ĝin kaj trovis ke *a* estas minimume 5 *e*. Esperanto ja estas lingvo *optimumigita* de Zamenhof. Nun ni povas kalkuli la rezulton, se ni postulas 1 tempodaŭron por kurso de Esperanto kaj 5 tempodaŭrojn por kurso de la angla. Nun $1 \Leftrightarrow (1 - 0,2) \cdot 5$, aŭ: $1 < 4,0$.

Do: ĉe maksimuma valora de la frakcio 0,2 kaj minimuma valora de la proporcio $a : e = 5$ (la plej *malfavora* situacio!) tamen estas 4-oble pli profite lerni Esperanton ol la anglan, do ankaŭ *labori* Esperante! Atentu: tio estas *minimuma* valoro, verŝajne la profito estas eĉ pli granda, pro du kaŭzoj: unue, la elparolo de Esperanto estas multe pli unueca ol tiu de la angla, do ankaŭ la interkompreno per E-o estas pli granda. Due, Esperanto estas super-etna lingvo, kio kaŭzas ke ĉiu sentas sin *egalrajta*, kio kreas pli bonan kunlaboran etoson.

Se tuj post la unua sukcesa Esperanto-kongreso (Bulnjo-ĉe-maro, 1905) oni estus komencinta *organizi* la

instruadon de E-o kiel la unua fremda lingvo en la lernejoj tutmonde, la supre kalkulita profito estus kreskinta dum pli ol 90 jaroj! Ne nur en la komerco! Verŝajne la mondo eĉ tute alie aspektus, eble eĉ pli pace! Sed tiu *oni* bedaŭrinde restis surda en siaj antaŭjuĝoj, ĝis la hodiaŭa tago.

G. F. Makink · Nederlando

Pli ol simpla realo

Ĝojigas min ke lastatempe aperas realismaj, pli-malpli objektivaj studoj pri la nuna kaj probabla estonta funkcio de Esperanto en la moderna epoko. Sobraj konkludoj antaŭvidas nefavoran perspektivon por Esperanto. Tiuj konkludoj estas taŭgaj por veki multajn el esperigaj revoj kaj por turni la atenton al pli konsekvenca observado de la cirkonstancoj.

Miaopinie la observantoj forgesas nur unu solan detalon: ke Esperanto ne estas fideinde kontrolebla per ekzaktaj ciferoj. Pri kio mi aludas?

La observantoj forgesas meti al si la demandon: pro

kio la plejmulto de la aktivaj esperantistoj restas en nia komunumo? La membreco alportas al ili el praktika vidpunkto nenian profiton.

La kerno de la nuntempe aktiva membraro konsistas el idealistoj, por kiuj pli valoras frateco ol profito, egaleco ol potenco.

El ni neniu iam forgesu ke la internacia lingvo ĉiam ankoraŭ estas revolucie aŭdaca ideo, kiu — kiel ĉio revolucia — ne estas absolute fideinde analizebla per sen-emocie objektivaj rimedoj. Gravus nur ke la ideo mem, kies konkreta manifestiĝo estas la lingvo, ne estu science refutebla kaj ke ni, sekvante, konservu ties moralan purecon.

Pro ĉio ĉi mi plenkore apogas niajn “Gvidliniojn por informado pri Esperanto”, kiuj celas, antaŭ ĉio, idealistojn, per la ĉefloka emfazo de demokratieco kaj lingva egaleco en komunikado transnacia. Dum longa tempo ni ankoraŭ ne povos altiri kaj reteni personojn kun profitema karaktero. Ili certe preferos la furorajn mondajn lingvojn.

Géza Kurucz · Hungario

El la poŝtkesto

Lingva rajto

Mi, 88-jara, legadis ĉiujn paĝojn de la revuo *Esperanto* dum 70 jaroj. Nun mi deziras, je la fino de mia vivo, ke unu fojon oni min legu.

Homo havas hom-raĵon: jen la esenco de demokratio. Oni devas diskriminacii neniun homon, laŭ haŭto-

koloro, nacieco, religio aŭ io alia. Ankaŭ la lingvo — parto de ies unika kulturo — havas memklare rajton, nome la lingvo-raĵon. Iuj lingvoj devas ne humiliĝi, aliaj devas ne privilegiĝi. Ne rajtas okazi, ekz., ke nur angla-parolanto promociiĝu al registara ofico, aŭ ke en internacia forumo nur la franca lingvo uzeblu, aŭ ke polico ne akceptu la peton de popolano kiu ne parolas la japanan ktp.

En Japanio, antaŭ centkelkdek jaroj, la registaro de Meiĵi-Restaŭro decidis fiksi, okaze de malfermo de sia lando al la vasta mondo, la lingvon japanan kaj instrui ĝin en oficialaj lernejoj, uzendan tra la tuta lando. Aldone al la graciaj lokaj paroloj, la japana lingvo multe ekutiliĝis tra la lando. Same, la pontolingvo Esperanto utiliĝos multe kune kun la lokaj naciaj lingvoj.

Iuj fantazias ke la angla lingvo devos esti la dua nacia lingvo en Japanio. Absurde. La japana lingvo siateritorie kaj Esperanto terglobe — tiel jam sufiĉas. Ĉies gepatra lingvo kaj Esperanto kune plene servu por la tutmonda komunikado. Se iu volas, tiu lernu kiun ajn lingvon laŭ sia ŝato, plaĉo kaj bontrovo, aŭ laŭ sia profesio.

OKUMURA Rinzō · Japanio (†)

Bona bildo, alia birdo

Kiel birdŝatanton, okulfrapis min la bela foto (okt., p.161) farita de Marianne Vermaas, iama direktorino de la CO. Mi tute ne sciis ke ŝi estis naturamanto kaj vizitis la naturparadizon en Galapagoj, la revon de ĉiu naturamanto. Sed krome okulfrapis min ke la fotita birdo ne estas albatroso, sed sulo, nome maskosulo (*Sula dactylatra*).

Ru Bossong · Nederlando

Ne forgesu Puĥovan

Traleinte la kongresan numeron, mi iom indigniĝis pro la preskaŭ plena forgeso pri Elena Puĥova. Fakte, ŝia koncerto kaj la Internacia Vespero de ŝi preparita savis la artan programon.

Mikaelo Bronŝtejn · Ruslando

Pli saĝan komencon

NGGE, la nederlanda sekcio de ILEI, sugestas ke regule aperu en la Jarlibro kaj la revuoj *Esperanto* kaj *Kon-takto* la rekomendo ke ĉiuj UEA-delegitoj akiru la mezan diplomon en la Internaciaj Ekzamenoj de UEA kaj ILEI. Tamen, pro konstatataj elementaj scio-mankoj, ĉu ne pli saĝe komenci peti “nur” *elementan* nivelon?

Aliflanke, pli ol dek jarojn sola voĉlegis por blinduloj la tutan revuon *Heroldo de Esperanto* volontulo, la pensiita kuracisto Hein Wernik en Nimego, Nederlando. Pro la lastatempa malpli facile legebla formato de tiu revuo, li devas rezigni.

Nun li akceptis enkasetigi *Internacia pedagogia revuo*, same kiel *Esperanto* kaj *Monato* haveblan por handikapuloj ĉe Kaseta Servo de NOSOBE, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk. Ĉe UEA aperis nova konto “noor-k” (kun komenca kapitalo el Premio Deguĉi) subtena al la deficitaj kaseteldonoj (parte senpagaj).

Rob Moerbeek · Nederlando
Provizora prezidanto de NGGE,
KS de NOSOBE

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



KOMPUTADO

Komputika Leksikono de Sergej Pokrovskij (ĝisdatigo de la papera eldono el 1995), kun 2518 terminoj: <http://www.esperanto.mv.ru/KompLeks/>

Pri komputaj terminoj konsultindas ankaŭ la konstruata Scienc-Teknika Esperanto-Biblioteko: <http://www.esperanto.hu/steb/>

Serĉiloj funkciantaj en Esperanto:

Dank' al Oscar Puig: <http://www.metamonster.com/>

Altavista, ĉe Stefano Kalb: <http://www.geocities.com/kalblando/altavist.htm>

LANDOJ, REGIONOJ

Roccastrada, itala komunumo kun 3000 loĝantoj prezentas sin ĉe <http://www.comune.roccastrada.gr.it/index.htm> aŭ ĉe <http://www.ciaotoscana.com/cultura/esperant/start.htm>

LITERATURO

Traduko de Alfred Rehfeldt el la libro “La sekreto” de Bô Yin Râ, spirita instruo en formo de interparoloj: <http://www.a-rehfeldt.de/>

MUZIKO

Kolekto de Esperanto-muziko (Kajto, Persone kaj multe pli), kun kantotekstoj en Esperanto: <http://www.mp3.com/stations/esperanto/>

PERSONE

Paĝoj de Willy Kokouvi el Togolando, kun poemoj: <http://www.dromadaire.com/willyko80/esperanto/>

RENKONTIĜOJ

Internacia Junulara Kongreso 2001, kun robot-voĉa invito: <http://purl.org/net/ijk2001> aŭ <http://esperanto.jeunes.free.fr/ijk2001/>

La israela Pac-Oazo kreis ligan al la raporto de Amri Wandel pri la seminario “Paco kaj kunekzisto” (vidu okt. p. 164): http://nswas.com/sfp/sfp_summer_00.htm

REVUOJ

El Popola Ĉinio (vidu p. 19): <http://www.chinareport.com.cn/>

Esperantisto Slovaka, ĝis nun n-ro 2000/1: <http://www.home.sk/www/esperant/es.htm>

SCIENCO

Akademio Internacia de San-Marino: <http://www.ais-sanmarino.org/>

Astronomia Esperanto-Klubo (vidu p. 11): <http://www.esperanto.org/AEK>

SERVOJ

Diversaj ĉe <http://www.esperanto.nu>: eLibrejo kun elektronikaj libroj en Esperanto, legeblaj surekrane en pres-simila aspekto; bildogramo por sendi salutojn kaj gratulojn per virtuala ilustrita karto kun E-teksto; ret-kartaro; anonctabulo ktp.

DISSENDOLISTOJ POR LERNANTOJ

http://www.egroups.com/group/101_ESPERANTO (angla); <http://www.egroups.com/group/curso-de-esperanto> (hispana); <http://www.egroups.com/group/esperanto-cursisten> (nederlanda); <http://www.egroups.com/group/eki> (portugala)

Per socia utilo al socia rekono

Harukuni EGAWA · Japanio

Esperantistoj atingos pli da agnosko kaj konateco nur per agadoj interesaj kaj utilaj por siaj samlokanoj – argumentas japana aktivulo.

En 1992, nome de nia urba Esperanto-Grupo, Verda Monteto, kaj de nia loka Unesko-societo, mi sendis la infanan koruson de mia urbo Ŭakajama al Eŭropo helpe de esperantista laborreto. Prezente japanajn kantojn ne nur japane sed ankaŭ Esperante en Bergen (Nederlando) kaj en la germana Bonn, la korusanoj gastis en la hejmoj de samaĝaj infanoj, esperantistoj kaj uneskanoj.

kun kvin urboj en kvin landoj. Sed bedaŭrinde la kontaktoj ankoraŭ restas je la nivelo de burokratoj kaj kelkaj intelektuloj. Tial mi proponis al nia urba gazeto ke ĝi priskribu per artikoloj la vivon en niaj ĝemel-urboj, por ke la urbanoj komprenu unu la alian kaj sentu sin amikoj, kvazaŭ samurbanoj. La gazeto konsentis, sed ne sciis kiel plenumi la ideon. Laŭ ĝia komiso, mi alvokis aliajn lingvaj

de nia delegita reto. Jen efika propagando, kiam fine de la artikoloj oni legas la nomojn de la sendintoj: “Perpinjana Esperanto-Centro”, “ano de Shandong Esperanto-Asocio”. Al mia posta baza E-kurso en Ŭakajama aliĝis 15 homoj, eksciinte pri la internacia lingvo el la urba gazeto.

La cirkulado de Esperanto

Mi trovis ke la movado de Esperanto funkcias en jena cirklo:

Propagando → Kurso → Membrigo → Aktivado

↑ akceli nian progreson per loke interesa praktiko al pli efika propagando por multigi esperantistojn ↓


La cirkulado montras ke loke interesa praktiko, nome nia Aktivado, videblas facile al eksteruloj kaj ligiĝas kun efika Propagando, dank’ al kiu multaj partoprenos en la elementa Kurso. Kaj rigardante la menuon de interesaj Aktivaĵoj, ili membriĝos trovinte tie sian propran rolon aŭ revon realigebla. Tamen ni devas atenti pri la ŝlosilvorto “Aktivado”, ĉar ĝi havas du flankojn: laborojn ene kaj ekstere de Esperantujo.

1. Ene de Esperantujo: kurso, Zamenhofa-festo, “kunvivadoj”, korespondado, hejma gastado kaj gastigo, renkontiĝoj, kongresoj ktp.
2. Ekster Esperantujo: ĉiu ajn temo interesa por lokaj civiluloj kiel supraj ekzemploj miaj, kiuj ligas la propran urbon rekte al aliaj landoj por krei “kulturon de paco”.

Por realigadi la duan, ni bezonas pli fortan transliman solidarecon de e-istoj, kio samtempe postulas pli da aktiveco ene de la E-movado por kunlabori kun eksteraj grupoj de la loka socio, kiuj pro la lingva baro ne facile kontaktiĝas kun samspecaj grupoj eksterlandaj. Sed tio ja igos nian movadon klare videbla al civiluloj kaj komprenigos kio estas Esperanto kaj kion ĝi celas.

Por niaspeca spico

Por tio necesas proponi realigeblajn kaj interesajn ideojn, kiujn ni iniciatu direkte al la loka socio. Tio estas tre grava punkto, precipe por ke la propagando por Esperanto havu ian spicon. Ŝajnas al mi ke nuntempe mankas al ni la punkto 2 por spirale grandigi “la cirkulon de Esperanto”,



Eksterlingva amuziĝo en la Unua Azia Infanfestivalo (Ŭakajama, 1998)

Kelkaj eĉ nun plu rilatas kun e-istoj nederlandaj.

En okt. 1988, por la Unua Azia Infanfestivalo de Internacia Konsilio de Organizaĵoj de Folkloraj Festivaloj [vidu majo ’99, p. 97], oficiale kunlaboris UEA, Unesko kaj tiu Konsilio por aranĝi ekspozicion el pentraĵoj de 1350 infanoj el 13 aziaj landoj. La kompleta bildaro estis eldonita libroforme en la lingvoj Esperanto, japana kaj angla.

Nun en Japanio furoras urbaj ĝemel-lingvoj. Ŭakajama havas ĝemelan rilaton


grupojn por kunlaboro. La grupo pri la angla rilatis kun la ĝemelaj urboj en Kanado kaj Usono, la korea kun tiu en Koreio. Al mi, esperantisto, restis la ĝemelaj urboj en Ĉinio kaj Francio. La temoj estis: edziĝfesto, eduksisistemo kaj turismo.

Glate, frue per delegita helpo

La seria publikigo de la artikoloj daŭris dek monatojn. Je admiro (kaj laŭdo) de aliaj lingvaj grupoj, per Esperanto eblis pli glate kaj pli frue plenumi la ĵurnalisman taskon, pro solidara helpo

Per Esperanto al la astroj

Johano Rapley - Britio/Francio



Kiel kombini sian fakan hobion kun sia preferata lingvo?
Alex Mikishev kaj liaj samklubanoj rapide trovis respondon.

Tel-Avivo, januaro 2000. Revante en sia laborejo dum paŭzo de la laborŝarĝo, fizikisto Alex Mikishev, kun mano ankoraŭ sur sia komputila klavaro, demandis sin kiel fari sian vivon pli interesa. Lia rigardo hazarde falis sur la Jarlibron de UEA. Ĉu eblus, ekzemple, kombini sian preferatan hobion, astronomion, kun sia lingvo preferata?

Trakribri la Jarlibron de UEA por elserĉi ĉiujn fakdelegitojn pri astronomio kun retadreso estis, bedaŭrinde, afero de nur du minutoj. Subite, tamen, ekbrilis la okuloj de Alex, kaj liaj fingroj rapid-takte tajpis kurtan retmesaĝon plurdirekte sendotan: “Ĉu interesus vin fondi Astronomian

E-Klubon?” Ene de kelkaj tagoj venis pozitivaj respondoj al lia adreso mikisal@hotmail.com. Naskiĝis Astronomia Esperanto-Klubo (AEK)! Alex ne hezitis kolekti ĉirkaŭ si 10-membran teamon por produkti, la unuan fojon en la historio de la E-movado, Astronomian Almanakon [€ 7,80 ĉe UEA; li montras ĝin sur nia bildo, flankate de Johano Rapley].

Astro-amantoj aliĝas

Dum la UK en Tel-Avivo, en la kadro de la kongresa programo, okazis la formala fondokunveno de AEK. Ĝis la kongresfino aldoniĝis 25 novaj membroj al la 39 astro-amantoj pli frue aliĝintaj. Ĉe Kvinpetalo en septembro,

kaj tiel nian movadon. Ni havas pli da akumulitaj informoj ol aliaj internaciaj grupoj kaj bonegan reton de delegitoj tra la tuta mondo, kian aliaj ne posedas. La aktivado de Kuracistoĵ sen Limoj kaj de UNICEF, nun internacie progresantaj, estas facile komprenata de civiluloj, ĉar iliaj temoj estas klaraj: “Urĝe kurace helpi mortontojn” kaj “Infanoj”. Ili aktivis kontraŭ problemoj videblaj por ĉiuj. La aktivado de Esperanto kaj de Unesko konsistas en “konstruado de paco” per tio ke ni penadas solvi

problem-erojn kuŝantajn ene de problemoj — kio estas io alia ol klare videble agadi en problemaj situacioj.

Ni bezonas aktivadi diversflanke, daŭre, dum longa tempo, per laborado iasence modesta, por krei “kulturon de paco”. Antaŭ ĉio, ni devas kontribue kaj serve helpi per konkretaj la lokan socion ĉirkaŭ ni: pere de Esperanto, kiu povas ligi homon kun homo,

kiel parto de astronomia staĝo, okazis la unua laborkunsido. Nun, je la ŝanĝo de du jarmiloj, ni povas kalkuli 73 anojn en 22 landoj! Laŭ Alex, al la sukcesa starigo de AEK en rekorda tempo kontribuis precipe Hélio J. Rocha-Pinto (Brazilo), Witold Cayzac, Patrick Lagrange kaj Johano Rapley (Francio), Lars Sözüer (Germanio), David Galadí-Enríquez kaj Antonio Sánchez (Hispanio), kaj Amri Wandel (Israelo).

Kiam pluvas meteoroj

Sed ĉu AEK povas esti utila al la mondo? Kompreneble! Alex atentigis



la plurkontinentan membraron pri la Leonidoj, meteora pluvo kiu okazas ĉiujare en novembro, kaj petis ĉiujn laŭeble ilin observi laŭ difinita sistemo


kaj raporti al li. Tiel okazis, kaj Alex pluraportis al fakaj kunordigantoj de informoj tiutemaj. La kunordiganto de la Rapida Komunikreto ĉirkaŭ la Leonidaj Kulmin-tagaj, Marc Gyssens, respondis: “mondvasta observado estas necesega [...], tial ni ĉiam bonvenigas novajn observantojn pro ilia evidente pozitiva kontribuo”. Rainer Arlt, la direktoro de la Observada Komisiono de Internacia Meteor-Organizaĵo, invitis la meteor-observantojn de AEK “kunlabori sur regula bazo”, ĉar “Meteor-observado donas bonegan okazon al amatoroj kiuj deziras kontribui al la scienco per malmultekosta ekipaĵo”.

Vi estas bonvenaj viziti nian paĝon en TTT: <http://www.esperanto.org/AEK!> ★

grupon kun grupo, informon kun informo inter loka socio kaj alia mondo trans la landlimoj. Tia aktiva volontulema kontribuo altiros atenton de la civiluloj, tiel ke Esperanto fariĝos klare videbla kaj intima ekzistaĵo. ★

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!



Recenzoj

Beletra

Luksaĵo por la E-literaturo

Australia Felix. *Noveloj.* 1999. 132p. € 11,10. **Neniu ajn papilio.** *Romano.* 2000. 337p. € 16,50. Ambaŭ: Trevor Steele. Vieno: IEM. 23 cm.


Ja havi niatendare verkiston kiel Trevor Steele konstituas veran luksaĵon por la E-literaturo; legi liajn librojn konstituas veran plezuron por la beletra sento. Aliro al la du prikomentataj produktoj liaplumaj tion pruvas. *Australia Felix*, novel-kolekto, kaj *Neniu ajn papilio*, romano, malkiel la plimulto — ve! — de niaj kreaĵoj, kompareblas kun plej elstaraj samĝenraj verkoj en la — aliflanke, ne ĉiam kontentiga — etnolingva panoramo de la nuntempa rakontistiko.

Nia Steele havas *kion* kaj scipovas *kiel* rakonti. Li, malkvieta engaĝiĝinto, amanto de la vivo, de la lumo, de la justo, de la homo kaj ties cirkonstancoj..., multon traspertis laŭlonge kaj laŭlarĝe de la mondo. Kaj tio, nome vero, plurfaceta vero projekciita sur literaturan planon, emanis el liaj kristalklaraj elplumaĵoj, abundaj je sukaj parolturnoj, je dialektaj esprimformoj oportunaj por karakterizi specifajn kolektivojn, je belaj sonoroj kaj malfacile atingebla simplo...

Kurta aŭ longa fabelo, novelo, romano: jen kategorioj kiujn Steele diferencigas ne nepre pro amplekso, sed, precipe, pro sento pri interna takto, ritmo, harmonio, kaj surbaze de la plia aŭ malplia proksimo inter la rakonta materialo kaj la poezio. Ĉiu historio havas sian spiriton, postulas da apartan traktadon — foje eĉ kineskan —,

kaj li elektas ĉiukaze la formon plej taŭgan por redoni la deziratajn iluminiojn. Tiel en *Australia Felix* kunvivis plej diversaj longoj, de dupaĝa rakonto ĝis novelo — kia novelo! (*Por savi nigran animon*), kia leciono aŭ lekcio pri rakont-arto! — najbara al kurta romano.

La 11 noveloj de la kolekto preparadigas la ĝenron, klasifikeblan — kiel jam aludite — inter poezio kaj romano: per ili la aŭtoro invitas nin ĉeesti jen ĉiutagan, jen eksterordinaran event(ar)on, lokante nin rande de la mistero, de la magio el antikvaj ŝamanoj, kiuj iniciate kaj inice fabelis parole, apudfajre. Plie, unueco ĉirkaŭ baza elemento: Aŭstralio, en kies pejzaĝojn, homojn, morojn multaj el ni eniĝis, danke al nia aŭstralia mondcivitano Steele. Kaj unu komuna zorgo: la aborigenoj, ilia subpremata kulturo, ilia ĉielklama sociala marĝenigo, la ĉi-koncerna hontiga hipokriteco de la blankuloj kaj ties institucioj — superbas ĉi-prie, krom la supre menciita, la novelo *La Koroboria Vespermanĝo* —, ĉio ĉi en la antipodo de



la titolo, kiu, tiele, sarkasme, iĝas protesto, la reverso de la monero, peras denuncon absolute senan je pamfleteco kaj semitan per tia vero ke ĝi prilumas tenebrojn kaj vibrigas plej aŭtentajn fibrojn de domo.

Neniu ajn papilio estas la konata, antologiinda Steele-aĵo *Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen*, plentrafe pligrandigita — de 152 al 337 paĝoj —, polurita kaj riĉigita. Kiel splenda rezulto! Ĝi havas la parfumon de la ĉefverkoj kaj la mirindan romanan teksturon palpeblan nur ĉe lertaj pentristoj de etosoj kaj fajnaj priserĉantoj de animoj. Enkonduko de plia rolulo, es-

plorinto de la protagonisto vivo, Mark E. Bryant — brilega solvo! —, krom ke ĝi ebligas al la intrigo transpreni ĝustaloken dialogojn kiuj aspektis iom perfortite en *Apenaŭ papilioj*, komplete plifirmigas la karakteron de dokumento celitan por la romano kaj permesas efikplenajn ludojn per — aŭ malliniigojn de — la tempo.

Kia plezuro tiel reveni al la universo de Mark Bryant, jam propramerite mita nomo niabeletr! Universo de kontrastoj en la kontrasto-riĉa Germanio de 1968 — nome la epoko kiam klaskonsciaj ĝejnuloj havis fingropinte la ŝancon draste ŝanĝi la historion (antaŭ ol tiu perdis sin mem) —: unuflanke, studentaj strikoj esperdone sukcesaj; kontrapunkte, ankoraŭaj spuroj de la dua mondmilito, diverslandaj homoj venintaj Germanien por batali kontraŭ Hitlero kaj, postmilito, restintaj kiel marĝenuloj. Ĉi-sceneje Mark Bryant, brita studento, amanto de la germana lingvo, etburĝeska mediokrulo, poiome engaĝiĝas, ĝis lia figuro, kontraste kun la apika falado de la ĵus menciitaj herooj, sociale gigantiĝas ĝis heroeco. Jen sesdekokece revolucia mesaĝo, kiu donas al la romano valoron universalan en la spaco kaj tempo. *Neniu ajn papilio* estas, sendube, unu el la pintoj en la historio de nia romanistiko.

Amiko Trevor, brakumojn; majstro Steele, gratulon kaj dankon!

Miguel Fernández · Hispanio



LIBRO DE AMO

*“Leganto, se vi estas pruda
Kaj naŭzas vin la amo muda ...”*

... tiam nepre ne aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom da ĝeesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanonco de “L’Akacio”, 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonetoj* (1931) k.a. Prezo: €6,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

splenda = belbrilega (PIV-Suplemento)

Verko de poeto-frato


Sur la spuroj de Federico García Lorca. Miguel Fernández (1950). Santiago: Universidade de Santiago de Compostela, 1996. 117p. 24cm. Kun fotoj. € 8,70.

Kiel profesia hispanisto, mi ne povas ne aplaŭdi la aperon de ĉi volumo. Ja se *Sur la spuroj de Federico García Lorca* ekzistus en la hispana, mi uzus ĝin kiel lernotekston en mia universitata kurso pri moderna hispana literaturo. Tre informriĉa ĝi estas, por relative mallonga monografio.

Miguel Fernández estas unu el niaj nuntempaj talentuloj. Kune kun aliaj iberskolanoj, li elstaras kiel kreiva antaŭenpuŝanto de niaj idiomo kaj horizonto, poezie (*El mia sonoraj soloj*) kaj proze (*Ekstremoj*), originale kaj traduke (*Sanga nupto*, *La domo de Bernarda Alba* — ĉefdramoj de Lorca).

Sur la spuroj estas libro pri poeto verkita de kunpoeto, poetfrato. Pro tio ĝi estas duoble ĝuebla, ĝuinda. Oni legu ĝin ne nur por (plu)informiĝi pri la mondfama figuro García Lorca, sed ankaŭ por frandi la proprajn belstilon kaj rakont-manieron, vigan kaj energi-plenan, de Fernández.

La implica leganto de ĉi volumo estas plej probable serioza (kvankam ne necese malamatora) studento de kompara literaturo. Sed ĝuste tial mi perceptas mankon: eble tia leganto jam iomete scipovas la hispanan, aŭ almenaŭ scivolemas pri ĝi. La tradukoj



de versoj de Lorca estas sufiĉe kompetentaj, eĉ foje imponaj, sed en onta reeldono ilin nepre apudu la originaloj hispanlingvaj.

Tia kritiko rezultas preskaŭ bagatela. Finleginte la libron, oni sin trovas jam trempita en la Lorca-n spiriton, kaj en posedo de precizaj scioj pri liaj verko kaj vivo.

Krom la ĉefteksto mem, de 50 paĝoj, enestas apendicoj, ampleksaj notoj, kaj tre interesa fotoalbumo. Ĉi-parte elstaras la eseo *Pri "Cigana romancaro"*, sufiĉe solida, fakte samnivela al multaj artikoloj aperantaj en konataj sciencaj hispanologiaj revuoj en Usono. Tamen, mi opinias ke ĉi-esee Miguel Fernández iom trotaksas la laboron de F. de Diego; tiu certe estas tre talenta, sed mi ne nomus lin "magiisto pri traduk-arto".

Sur la spuroj mi lokus apud *Lirikaj perloj de Al-Andalus* de A. Marco Botella [vidu maj. '98, p. 92], kiel modelan tekston E-lingvan pri la riĉaj literaturaĵoj naskiĝintaj en la ibera duoninsulo. Tre bele estus, se similaĵoj aperus pri Quevedo, Valle-Inclán, Angel González... en nia Esperantujo certe ne mankas virgaj terenoj; ilin malkovru niaj veraj pioniroj, niaj stilomajstroj.

Petro Braŭn • Usono

Al-pinta verko

La avo en la ĉareto (1988). Gudrun Pausewang (1928). Bildoj de Inge Steineke. El la germana trad. Nora Caragea. Frankfurt: la tradukinto, 1999. 62p. 21cm. Bind. € 9,30.

Avo petas nepon puŝi lin en ĉaro al montopinto kun dekliva panoramo. Li tediĝas pri la vivo. Etapon post suprenira etapo, li malkovras kreskantan litanion da veoj. Sed ĉiuetape li renkontas amikojn; al ĉiu li povas helpi iumaniere. Ĉu ili konvinkos lin forlasi sian gravit-utiligan planon? En simpla, elvokiva lingvaĵo ĉi tiu ĉenrakonto prezentas sin.



La verko impresas profesie, kun granda, klara litertipo, solida bindo kaj kun agrablaj desegnaĵoj, kiuj bildigas ekzotikan kaj kredeblan, sed neniam precize difinitan landon aŭ kulturon. Kiel imageble, la rakonto havas sian makabran flankon, sed tio estas nek tro forte trudita nek troigita. Bela verko, taŭga por laŭtleĝado, kiu meritas sian premion (Infanlibro de la Jaro, 1999).

Stefan, Karina kaj Hajnal MacGill
• Hungario

Kroniko kun amo

Historio de Esperanto-movado en Bjalistoko. Zofia Banet-Fornalowa (1929). Svidniko: Lublina E-Instituto, 1999. 178p. 27cm. € 16,50.

El ĉi tiu detala studo en formo de kroniko, mi multe lernis pri Zamenhof, pri la rilato inter judoj kaj aliaj, pri la vivo kaj kompreneble la Esperanto-movado en la naskiĝurbo de Zamenhof.

La teksto elradias la amon de la aŭtorino al Esperanto kaj al Zamenhof. Eble tial plurfoje ŝi adoptas malpli faktecane stilon, eĉ enŝovas supozojn personajn, kiel pri Zamenhof, p. 12: "Kial? Ĉu li volis prisilenti, ke lia amata urbo, al kies loĝantoj li esperis mesaĝi per sia lingvo pacon kaj fratecon, ne akceptis lin, ke tie li trovis nek panon, nek moralan apogon?" Kvazaŭ-romanaj rakontoj eble malplitedigos la studon por nehistoriistoj; tamen, en studo oni prefere skribu nur objektivajn faktojn. En dek paĝoj (pp. 67-76) la aŭtorino detalege priskribas la nazian konkeradon de Bjalistoko en 1941, senrilatan al la Esperanto-movado. Kvankam interesa kaj grava, tiu parto ne necesas por la priskribo (de post p. 76) de la detruo de la Esperanto-movado en Bjalistoko.

Multaj fontoj estis konsultitaj por la studo, sed mi vane serĉis kompletajn bibliografiajn notojn. Tio malfaciligos la verkadon de postaj aŭtoroj uzantaj ĉi tiun studon. La lingvaĵo estas bonega, nur la malĝusta uzado de la artikolo (ekzemple en la titolo de la studo mem oni atendas la Esperanto-movado) kaj kelkaj tro komplikaj formoj (p. 9: "ĝi estis situanta" anstataŭ "ĝi situis") iom ĝenas. Veraj lingvaj eraroj feliĉe maloftas, mi trovis nur kvinon da ili. La aŭtorino kaj eldonistoj precipe atentis la enhavon. Tamen eblus eviti la grasecan litertipon, ĉapitran titolon tute sube de paĝo (p. 10), aŭ splitiĝon de la nombro 1000 al du linioj. Aldono de kelkaj grafikaĵoj (ekz. p. 10 pri la nacieca divido en la Bjalistoka regiono) malpli-pezigus la tuton. Finas la studon okpaĝa listo de nomoj kaj 25 paĝoj da fotoj kaj dokumentoj.


Ĉi tiuj mankoj estas nur detaloj kompare al la interesa enhavo, kiu rezultis el la sendube fervora kaj temporaba laborego de la aŭtorino. Mi konsilas legadon de ĉi tiu studo al ĉiu iel interesata pri la evoluo de la urbo el kiu originas la interna ideo malantaŭ Esperanto.

Marc Vanden Bempt • Belgio

Tri libroj – pli ol tri religioj

Libere de la konoj (1969). J. Krishnamurti (1895-1986). El la angla trad. Yves Bachimont. Varna: Bambu, 1999. 95p. 20cm. € 7,80. **Nombroj. Biblia Libro.** El la hebrea trad. Gerrit Berveling. Chapecó: Fonto, 1999. 105p. 21cm. € 9,90. **Tezoj pri islamo kaj la vivo de la islama profeto.** Mustar Abasi (1930). Red. Nino Vesela. Murree: Universala Islama E-Asocio, 2000. 26p. 30cm. € 4,80.

Libere de la Konoj estis verkita de Jiddu Krishnamurti (1895-1986), hinda saĝulo ricevinta privatan edukon kaj trejnadon en Anglio de la teozofoj Annie Besant kaj C. W. Leadbeater, kiuj kredis lin Mesio. Krishnamurti tamen ekde 1929 rifuzis la rolon de Mesio, ne plu nomis sin teozofo kaj – kiel libera prelegisto kaj saĝulo – “volis igi la homojn absolute,



senkondiĉe liberaj”. Dum multaj jaroj li loĝis en Kalifornio, kie multaj konatoj, i.a. Chaplin kaj Garbo, interesiĝis pri li. Lia foriro el la teozofio lasis spurojn en liaj instruoj. Krishnamurti pretendas nei ĉiujn aŭtoritatojn – inkluzive la fondintojn de religioj, dogmoj kaj instruoj –, propagandante la kompletan liberecon de la homo. Eble oni povas koncize esprimi lian mesaĝon per la frazo: “Nur per plena neo, kiu estas la plej alta formo de pasio, tiu afero nomata amo estiĝos.” (p. 94). Sur tiu bazo li traktas temojn kiel konscio, deziro, perforto, amo, meditado ktp. Religi-historiisto tamen vidas ke Krishnamurti estis forte influita de hindaj pensmanieroj de sia jarcento, al kiuj aldoniĝis la deziro pri libereco disde aŭtoritatoj, karakteriza por Eŭropo kaj Usono. Tio neniel malkreskigas lian grandan signifon, precipe por la evoluo de la skolo “nova erao”, furora en nia tempo. *Libere de la Konoj* estas bone tradukita kaj bele eldonita verko.

Nombroj, Biblia libro, aperis tradukita de Gerrit Berveling. Bibliaj libroj tradukiĝas plurfoje en diversajn lingvojn, ĉar oni trovas novajn manuskriptojn de la hebrea teksto, ĉar progresas la scio de la pra-hebrea lingvo, ĉar ekzistas malsamaj skoloj pri la plej bona prezento de la ĝusta signifo en la cellingvo, kaj ĉar la cellingvo ŝanĝiĝas.

Pri la kapablo de Gerrit Berveling traduki hebrean tekston mi ne povas juĝi, sed mi neniel pridubas ĝin. Mi tamen povas tuj diri ke la rezulto en Esperanto estas pli flua kaj rakonta lingvaĵo ol tiu Zamenhofa, iom tro imitanta la hebreajn frazturnojn. La traduko – laŭ modelo de aliaj modernaj tradukoj – tamen konsentas ke ekzistas versikloj neklaraj (ekz. 24:7) kaj necertaj tradukoj (ekz. 25:8). Bonvenas ke Berveling faras novan tradukon de la Biblio; mi dubas nur pri tio ĉu necesas eldoni ĉiujn bibliajn librojn unuope. Estus pli bone unue publikigi ilin en Interreto (por ke fakuloj povu dis-

kute proponi ŝanĝojn, se la tradukinto tion deziras), kaj poste publikigi tutan Biblion en traduko de Berveling. Neniu deziras aĉeti aron da bibliaj kajeroj.

Tezoj pri islamo kaj la vivo de la islama profeto estas kompendio pri islamo, kiu celas respondi dek demandojn, kiujn ricevis Universala Islama Esperanta-Asocio de organizantoj de trilanda renkontiĝo (apr. 1997) en Akeno, Germanio. (Ankaŭ urdu-lingvaj ĵurnaloj raportis pri la renkontiĝo.) La demandojn respondis landaj kaj religiaj sciuloj en Pakistano. Oni demandas ekzemple: “Kial islamo disvastiĝas forte en Afriko kaj Usono?” kaj “Ĉu la islamaj punoj estas brutalaj, malhumanaj?”. La demandoj estas responditaj per teoriaj konsideroj kaj per ekzemploj el la Korano (nomata ĉi tie *Kuraano*). Mankas pritrakto de unuopaj okazaĵoj, kiam ekzemple islama tribunalo donis punon laŭ islama leĝo. Krom la respondoj enestas artikoloj pri la Korano, la Profeto, kaj aro da citaĵoj el la Korano kaj el la t.n. Hadisoj (vortoj de Muhamado). Ĝis nun estis malmulte da literaturo pri islamo en Esperanto. La kompendio estas simpla sed bona kontribuo al forigo de tiu manko.

Leif Nordenstorm • Svedio

Ne per “kio-estas-tio”

Okulo. Stefan MacGill (1948). Ilustris Mónika Molnár. Budapeŝto: ILEI, 1999. 40p. 22cm. € 4,50.

Jen gaja kaj agiga lernolibro por 6-10-jaruloj. La titolo vortludas kun la cifero 8 (aĝo), *okuloj* (atentemo?) kaj *Okulo*, la ridetema ĉefrolulo.

La libreto uzas ĉ. 280 radikojn, el kiuj 40 estas verboj, transitivaj kaj netransitivaj. La lernantoj tuj ekdialogos, imitante la abunde desegnitajn roluletojn. Je la fino troveblas laŭpaĝa vortlisto kaj laŭleciona listo de la instruendaj vortoj kaj (gramatikaj) modeloj, ekz. imperativo, vortorda libero kaj la regula akcento sur la antaŭlasta silabo, kiun la etuloj lernas per dusilabaj kaj pli longaj nomoj en amuza dialogado (Karlo, Liza/Emilo, Fantomo).

Kompreneble la instru-metodo kaj la klaseja etoso dependas ne nur de la lernolibro sed de la instruisto, kiu estu elpensema, vigla kaj fleksiĝema. *Okulo* ne estas por tiuj kiuj prudente kaj serioze komencas per “kio-estas-tio”-metodo. Unu paĝo estas dediĉita al komputil-vortoj, kaj unu kanto lernigas la korpopartojn, kun muzik-notoj de Perlo Miela. Troveblas ankaŭ krucvortenigo kaj modelletero al korespondamiko. Preserarojn mi ne rimarkis, krom la manko de unu supersigno en *spac-ŝipo* (p. 22).

Ilustraĵoj gaje kaj utile plenigas preskaŭ ĉiujn paĝojn. Kelkaj estas koloraj, sed ok-jaruloj certe plezure kolorigos ankaŭ la ceterajn. Paĉjo en kelkaj bildoj aspektas tro maljuna, aveca (p.15), tamen li moderne helpas en kuirejo. Sur p. 9 (“Kie ni loĝas?”) videblas la kontinentoj, ĉiu kun “tipa” enloĝanto. Bedaŭrinde la bildo pri afrikanoj montras tro facilan solvon. Prefere ni ne uzu tiajn kliŝojn de pasintaj jarcentoj. Ne multe pli prezentablaj aspektas la loĝantoj de Sud-Ameriko.

La hejmpaĝoj rekomendataj al la uzantoj de *Okulo* estas <http://lps.uniroma3.it/kler> kaj <http://lps.uniroma3.it/ilei>. La libro trovu multajn junajn lernumulojn en la tuta mondo!

Raita Pyhälä • Finnlando



Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdatan katalogon de haveblaj varoj konsultu ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Animo, La. *La Epoko: Kajero 143(39).* Ichok Lejbuŝ Perec (1852-1915). El la jida trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: 1993. 20p. 28cm. Novelo de unu el la tri fondopatroj de la juda literaturo, moderna romantikisto. € 3,90.

En la spegulo de vorto. *U dzerkali slova.* Bohdan Andruŝkiv (1947). El la ukraina trad. Nikolao Kriveckij. Ternopil: Ukrmedkniga, 1999. 93p. ISBN 966 7364 47 X. 20cm. Du-lingva: Esperanta-ukraina. Pensoj filozofiaj, etikaj, religiaj. € 4,50.

Epoko, La. *Kajero 4.* Rushdie, Kawabata, Usakiewicz, Declerck. Svidniko, 1990. 39p. 28cm. Fragmentoj el verkoj de Rushdie kaj Kawabata; du recenzoj pri verkoj de Valano kaj Piĉ. € 6,60.

Epoko, La. *Kajero 146-1.* Badr Ŝakir As-Sajjab, Sa'di Jusuf k.a. El la araba trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo, 1993. 78p. 28cm. Antologieto de nuntempaj poetoj arabaj, precipe el Irako. € 8,70.

Epoko, La. *Kajero 147.* Ghassan Kanafani (1936-72). El la araba trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo, 1993. 137p. 28cm. El la verkoj de la plej fama palestina poeto. € 12,00.

Eterna paco en iu-fora-lando, La. *La Epoko: Kajero 143(44).* I. L. Perec. Vidu ĉe Animo. 13p. € 3,60.

Hobito, aŭ tien kaj reen, La (1937). John Ronald Reuel Tolkien (1892-1973). El la angla trad. Christopher Gledhill kaj William Auld (poemoj). Jekaterinburg: Sezonoj, 2000. 223p. 20cm. Ilus. Maŝa Baĵenova. Bind. Mirfabelo de la aŭtoro de *La mastro de l' ringoj*, verkita antaŭ tiu trilogio. € 15,00.

Inter du montoj. *La Epoko: Kajero 143(20).* I. L. Perec. Vidu ĉe Animo. 19p. € 3,60.

Komenco, La (1986). Andrzej Szczypiorski (1924-2000). El la pola trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: la tradukinto, 1993. 150p. 28cm.

Pro la pinĉo da tabako. *La Epoko: Kajero 143(23).* I. L. Perec. Vidu ĉe Animo. 16p. € 3,30.

Rusaj amnoveloj. Anton Ĉeĥov (1860-1904), Ivan Bunin (1870-1953), Vladimir Nabokov (1899-1977). El la rusa trad. Grigori Arosev, Aleksander Korĵenkov. Jekaterinburg: Sezonoj, 2000. 23p. 20cm. Rakontoj de tri aŭtoroj tre malsimilaj, kun etoso komune melankolia. € 2,10.

Samuel Bogumił Linde kaj lia provo krei interslavan esperanton. *Bazoj ideologiaj, historiaj kaj lingvaj.* Tomasz Chmielik (1957). Svidniko: Lublina E-Instituto, 2000. 36p. 28cm. Pri projekto el ĉ. la jaro 1800. € 5,40.


Se oni diras, ke frenezulo, ekkredul! *La Epoko: Kajero 143(32).* I. L. Perec. Vidu ĉe Animo. 19p. € 3,60.

Ŝtrajmlo, La. *La Epoko: Kajero 143(27).* I. L. Perec. Vidu ĉe Animo. 18p. € 3,60.

Tajloro Berl. *La Epoko: Kajero 143(26).* I. L. Perec. Vidu ĉe Animo. 13p. € 3,30.

Transformiĝo de la melodio. *La Epoko: Kajero 143(18).* I. L. Perec. Vidu ĉe Animo. 24p. € 3,90.

Eble vi bezonas la maldekstran — sed ne por kompreni la dekstran.



Romano pri vidvino de juda kuracisto, kiu, travivinte la germanan okupacion en Varsovio, forlasas Pollandon en 1968 pro la antisemitismo tie. € 13,50.

Lag-baomer. *La Epoko: Kajero 143(43).* I. L. Perec. Vidu ĉe Animo. 11p. € 3,30.

Pocket Esperanto Dictionary. *English-Esperanto, Esperanto-English.* Andrew McLin. Rotterdam, UEA, 2001 (2-a eld.). ISBN 92 9017 072 7. 8+406p. 16cm. Pli ol 70 000 vortoj kaj esprimoj. € 15,00.

Bonvolu noti ke ekde la 1-a de jan. 2001 la aldonvalora imposto je ne-libraj varoj (diskoj, insignoj k.s.) altiĝas de 17,5% al 19%.

KLEKS en sia nigra serio prezentas...

NI TOSTU LA VERDAN FORTUNON

Kabaredaj kaj bardaj kantoj de Georgo Handzlik

La bardo sen barbo jam pli ol dudek jarojn vagadas de lando al lando tra Esperantaj kluboj... Ankaŭ vi gustumu la etoson.

Bielsko-Biała: KLEKS, 1999. Kompakt-disko 51-minuta. 19 kantoj. € 15,00. Triona rabato ekde tri ekz. ĉe UEA.



INTERNACIA SEMAJNO DE AMIKEKO

La lasta plena semajno de februaro (de 18. ĝis 24.) staros sub la devizo "Amikeco trans limoj". Kreita por konsciigi pri la amikiga rolo de internacia lingvo, ĝi estas aparte taŭga okazo por aranĝi komunan eventon kun ne-esperantistoj, kun societoj de aliaj movadoj.



Kaj plue...




BAHAISMO: Bulgara branĉo

En sia septembra kunveno, post la kongreso de Bulgara E-Asocio (vidu okt., p. 179), la bulgara sekcio de Bahaa E-Ligo (BEL) taksis sukcesa sian agadon en la lastaj tri jaroj. Prezidata de Maria Taŝeva, ĝi estas kun 55 membroj la dua plej multnombra sekcio de BEL (malantaŭ la germana). En 1999 en la nacia bahaa centro okazis speciala seminario por bahaaj esperantistoj. (M. Taŝeva)

FILMO: Slovena festivalo

En la 4-a Internacia Festivalo de Video-Filmoj en E-o (30 okt., Maribor), partoprenis 6 filmoj de 3 aŭtoroj. Unua premio estis donita nur en la dokumenta sekcio, al *Kagbeni – regiono de Himalajo*, de Hedwig Igné Van Der Bruggen (Belgio). Por konkursi en la 5-a festivalo, fine de sep. 2001, eblas sendi VHS-formatajn filmojn ĝis 10 sep. al E-Societo Maribor (Besednjakova 1, SI-2000 Maribor, Slovenio). (Z. Tišljar)



TEJO-SEMINARIO

"La lingva ĉielarko – ponto al kulturaj trezoroj"

25 marto - 1 aprilo 2001, Budapeŝto, Hungario
Informoj ĉe: Hakan Lundberg, Fisksatra Torg 12
SE-133 41 Saltsjöbaden, Svedio; ☎/✉+46 8 717 78 69
Retpoŝta adreso: Hakan.Lundberg@home.se

Seminaria retpaĝo: <http://www.esperanto.org/tejo/seminarioj/>

INSTRUADO: Deviga Esperanto


Dank' al instruistino Svetlana Mi-roŝniĉenko, en la Gimnazio n-ro 271 de Sankt-Peterburgo E-o estas deviga lernaĵo en po du horoj semajne por ĉiuj klasoj 2, kaj poste libervola ĝis klaso 10. (M. La Torre)

LITERATURO: Historio verkata

Historion de la E-literaturo verkos Carlo Minnaja (poezio) kaj Giorgio Silfer (prozo, teatro), por eldono ĉe LF-koop post du jaroj. Antaŭparolos W. Auld. (Heroldo)

SCIENCO: E-o en datenbankon

Iniciate de André Weber kaj Rudi Hauger, daŭras diskuto por enmetigi E-on kiel unu el la lingvoj de la datenbanko de la usona Nacia Instituto por Labora Sekureco kaj Sano pri san- kaj medi-endanĝerigaj riskoj de kemiaĵoj, sub aŭspicio de Monda San-Organizo. Por kunlabori, kontaktu d-ran Manfred Westermayer (Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen, Germanio; ☐Manfred@Westermayer.de). (ISAE-nova-Bulteno)



FILATELO:

JARMILO FRUE MARKITA

Por marko-stampi la komencon de nova jarmilo, la brazila poŝto jam pasintjare, la 1-an de januaro 2000, emisiis poŝtmark-serion sub la titolo "Stampi la estontecon". La kvar poŝtmarkoj montras desegnojn de kvar brazilaj infanoj, kiuj gajnis en tutlanda konkurso el inter 4525 desegnoj. Ĉiu folio, konsistanta el 16 poŝtmarkoj, surhavas 8 t.n. talonojn, kiuj prezentas la saluton "Vivu 2000" en la lingvoj angla, ĉina, Esperanta, franca, germana, hispana, itala kaj portugala. Sur la Esperantlingva talono (dekstre, supre) oni vidas sunon kaj ĉielarkon – signojn de espero. (Gert Drucker, *La Verda Lupeo*)

ao de R\$ 0,08 destinada ao Fundo Nacional para a





AŬSTRIO: Komuna tegmento

En eksterordinara ĝenerala kunveno la 7-an de okt., Aŭstria E-Federacio (AEF, la landa asocio de UEA) decidis forlasi sian longe servintan propran ejon pro ties financa ŝarĝo, kaj translokiĝi al la lokalo de Aŭstria E-Movado (AEM, Margaretengürtel 100/11/2, AT-1050 Wien). AEM unuanime konsentis kunlabori kun AEF. Komence indiko pri la esperata unuiĝo de AEM kaj AEF estas ke ekde 2001 ili eldonos komunan gazeton. (*Aŭstria E-Revuo*)

Dum "Tago de malfermaj pordoj" la 26-an de okt., Katalin Smidéliusz gvidis Cseh-metodajn kursetojn en la Viena Internacia E-Muzeo (IEM) por la vizitantoj. (Ret-Info)



POLLANDO: Fronte al arto

Pli ol 140 partoprenantoj ĝuis en la 16-a ARKONES (Artaj Konfrontoj en E-o, 29 sep. – 1 okt., Poznań) prelegojn kaj prezentojn de i.a. historiistino Zofia Banet-Fornalowa, aktoroj Jadwiga Gibczyńska kaj Jerzy Fornal, poetoj Jarl Hammarberg kaj Lidia Ligęza.

ĈINIO: Teo-festivalo

Laŭ propono de ZHANG Xuesong, Esperanto funkcios kiel ponto en la 10-a Xinyang-a Teo-Festivalo (18-21 majo) por prezenti diverslokajn morojn de teumado ks. Dum la festivalo okazos

ankaŭ Simpozio de E-komerca Kunlaboro. Informoj ĉe s-ro ZHANG Xuesong, Changtaiguan Dianguansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio (☎+86/376/882-15-53; ✉deodaro@263.net). (Ret-Info)

HUNGARIO: Restariĝos UK-ejo

La Budapeŝta Sporthalo, kiu gastigis la 68-an UK (1983) kaj suferis incendion antaŭ jaro (vd. feb., p. 37) estos rekonstruita antaŭ la fino de 2002. (*Magyar Hírlap*)

MALAGASIO: Eklipsa ekskurso

Malagasa E-Unuiĝo (pere de Universala Kultura Servo, ✉uks@dts.mg) organizas turisman restadon okaze de la suneklipso videbla la 21-an de jun. 2001 el la suda parto de Malagasio. (*Inter ni*)

POLLANDO: Gratulu Gostyń

En gimnazio de la urbo Gostyń, Halina Radola ekinstruis Esperanton. Troviĝis 40 lernemuloj (pli ol por la germana lingvo), sed nur 25 lokoj. Forte subtenis la ideon de E-instruado d-ro Zbigniew Kułak, pola senatano. Gratulmesaĝoj bonvenas al: s-ro Józef Gerowski, Dyrektor Gimn. w Gostyniu, ul. Hutnika 3, PL-63-800 Gostyń, Pollando; ✉gigostyn@poczta.wp.pl. (S. Ó' Riáin)

ĈINIO-SVISLANDO: Partnere

Kadre de partnera rilato, la svisa urbo Zuriko jam plurajn jarojn subtenas multajn projektojn en la ĉina Kunming. Pro la lingvaj baroj la partnereco praktike limiĝas al oficialaj kaj komercaj kontaktoj — kun la escepto de E-Societo Zuriko (ESZ), kiu flegas partnerecon kun e-istoj en Kunming. ESZ subtenas la organizadon de E-kursoj por turismaj fakuloj kaj membroj de etnaj minoritatoj en Kunming. (D. Weidmann)


La unuan fojon en sia 95-jara historio, ESZ superis la nombron de 60 membroj. Ilia averaĝa aĝo estas ĉ. 40 jaroj. (*SES Informas*)

FRANCIO: Progreso 2001

La estraro de Unuiĝo Franca por Esperanto en oktobro decidis lanci kampanjon eventuale nomotan "Progreso 2001". Reprezentantoj de la asocioj partoprenontaj debatos komence de 2001 pri la detaloj de tiu kampanjo, kiu daŭros du jarojn. (*Okazas!*)

SVEDIO: Zamenhofa kravato

Svedaj televidantoj povis la 25-an de aŭg. subite vidi ridetan, moviĝantan L. L. Zamenhof dum sekundoj. La programo temis pri viraj kravatoj, kaj tiu de Zamenhof ŝajne vekis intereson ĉe la programestro. (S. Svenonius, NUN)



ĈEĤIO: Esperanto-arbo

Por la 7-a Konferenco de Ĉeĥa E-Asocio (13-15 okt., Znojmo), oni eldonis E-lingvan bildkarton kaj plantis Esperanto-arbon.



BOROS: Ministra bontrovo

Imre Boros (53-jara), la ministro kunordiganta en Hungario la t.n. PHARE-programojn de Eŭropa Unio, diris al esperantisto Jozefo Baksa ke li iam eklernis Esperanton kaj "trovas bona la ideon de neŭtrala internacia lingvo", sed "bedaŭrinde, ne renkontas [E-on] dum siaj vojaĝoj. Boros, kiu regas la lingvojn anglan, germanan, hispanan kaj rusan, promesis verki rekomendajn vortojn por la kovrililo de lingvopolitika libro de e-isto László Gados. (J. Baksa, esp-en-hung@egroups.com)

DMITRIJEVSKAJA: Kulturologo

Defendinte disertaĵon pri "La internacia Esperanto-movado kiel subjekto de interkultura komunikado" la 21-an de junio en Sankt-Peterburgo, Julia Dmitrijevskaja-Nilsson ricevis la universitatan gradon de kandidato pri kulturologio (grado simila al la doktora). La defendo pasis plej glate, kun poraj



La Hundo

balotoj de ĉiuj 15 profesoroj en la juĝkomisiono. Nun Dmitrijevskaja-Nilsson planas verki libron kun kompara analizo de proverboj en la lingvoj angla, Esperanta kaj masaja, kaj eble lernolibron de Esperanto. (La Ondo de Esperanto)



MAURER: Merit-medalo

La 7-an de dec. la germana aktivulo Bernhard Maurer (56-jara)

ricevis de la urbestro de Erlangen, d-ro Siegfried Balleis, ŝtatan meritmedalon aljuĝitan de la federacia prezidento Johannes Rau. (Vidu bildojn ĉe <http://www.fen-net.de/~ea1448>.)

Dank' al klopodoj de la Erlangena E-grupo, ekzistas bilda prospekto pri la urbo kun enmetita folio en Esperanto, petebla de: Verkehrsverein Erlangen e.V., Rathaus, Rathausplatz 1, DE-91052 Erlangen; tourist@stadt.erlangen.de.

SCHAEFFER: Savis vivon

"Ilo en la manoj de dio" sentis sin Karl-Heinz Schaeffer (58-jara), delegito en Aalen (Germanio), kiam la 24-an de nov. 1999, en la stacidomo de Oberkochen, li savis la vivon de malforte vidanta aĝulino, falinta inter la reĵojn ĉe proksimiĝo de trajno. Laŭ mansignalo de Schaeffer, la vagonaro haltis je 15-metra distanco, dum li, saltinte inter la reĵojn, restarigis la sinjorinon. Ŝokita, ŝi relevis sian ombrelon kaj foriris senvorte. (Dia Regno)



GAINES: Esperanta simfonio

La usona e-isto David Gaines (39-jara), profesia komponisto, verkis 30-minutan "Simfonio n-ro 1 La Esperanta" por mezosopranulino kaj orkestro, en kvar movimentoj, kun Esperantaj tekstoj de Zamenhof, Marjorie Boulton, Penka Papazova kaj de Gaines mem. La verko premieris en la ĉeesto de Gaines, la 6-an de okt., en Olomouc (Ĉeĥio), plenumate de la Moravia filharmonio kaj de Master Musicians Collective Boston. Kompaktdisko kun ĉi tiu kaj aliaj Gaines-verkoj estos preta en 2001.

EVENTOJ La plej ofta E-gazeto!
pk. 87, HU-1675 Budapest, Hungario

Oficiala informilo

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Hispanio: L. E. Hernández García; R. Urueña de Hernández.

PATRONOJ DE TEJO 2001

Belgio: Grégoire Maertens. Finnlando: Anna Ritamäki; Heta Kesälä; Akseli Kirsilä; Anja Karkiainen; Synnöve Mynttinen; Vuokko Tellervo Heinäsuo. Germanio: August Franke; Nora Caragea. Japanio: Kazuyuki Hosomi; Koichi Kai; Utako Kobayasi. Nederlando: Jeroen D. Balkenende; W. L. van Leeuwen.

SOCIETO ZAMENHOF 2000

Germanio: Ina Tautorat.

SOCIETO ZAMENHOF 2001

Argentino: Rodolfo G. Calógero. Belgio: Elfriede Ernst; Grégoire Maertens; Karel Van Steenberghe.

Britio: John C. Wells. Finnlando: Heta Kesälä; Juho Pyykönen; Meri Lehtinen; Synnöve Mynttinen. Francio: André Albault; André Gilles; Jean Gibaux. Germanio: August Franke; Harry Bily; Bruno Vogelmann; Heinz Schindler; Ina Tautorat. Hispanio: L. E. Hernández García; R. Urueña de Hernández. Japanio: Kyotaro Deguti; Kazuyuki Hosomi; KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo); Wilhelm Schmid; SUGANO Takeo; Nobuyuki Syōzi; SYŌZI Keiko; Saitō Tume; YAMASAKI Seikō. Nederlando: Maud Meijwes; Sja van Wijngaarden; Yfke Weidema. Norvegio: Tamiko Kaŭakami-Nielsen; Tomas Jansson. Portugalio: José Manuel Gaspar Martins. Svedio: Harald Andersson; Leif Holmlund; Sam Fritz; Tore Johansson. Usono: Alberta Seabold Casey; Humphrey Tonkin; Jane Edwards; Robert A. Swenson. Venezuelo: Juan Eduardo Bachrich.

DONACOJ 2000 (EUR)

ĝis la 30-a de novembro

Afrika Kapitalo: Japanio: E. Miyoshi 490,89.

Sumo ĉi-jara 2642,28.

Fondaĵo Afriko: Finnlando: T. Sormunen 50,00. Germanio: M. Bettmann 100,00. Svedio: J. Hammarberg 11,52. Sumo ĉi-jara 8302,38.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: J. R. Piton 58,21. Kroatio: S. Bokulić 45,38. Venezuelo: J. Bachrich 119,26. Sumo ĉi-jara: 3450,51.

Fondaĵo Canuto: Britio: W. H. Simcock 7,56. Finnlando: T. Sormunen 100,32. Nederlando: N. C. Kuiterman-van Goor 10,00; A. E. Moerbeek-Prins 56,72. Slovakio: S. Marček 2,18. Sumo ĉi-jara: 4473,68.

Junulara Fondaĵo: Pollando: S. Mandrak 5,00. Sumo ĉi-jara: 1800,48.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Britio: W. H. Simcock 7,56. Nederlando: N. C. Kuiterman-van Goor 10,00. Sumo ĉi-jara: 1146,36.

Volontula Fondaĵo: Britio: W. H. Simcock 7,56. Nederlando: N. C. Kuiterman-van Goor 9,75. Sumo ĉi-jara: 398,66.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



Prezidenta plaĉo


La slovenlingva eldono de la libro *Eŭropa ideologio* de Zlatko Tišljar (vidu feb. '00, p. 32), kies parto estis premiita en Belartaj Konkursoj en 1998, aperis kunfinancite de la Soros-Instituto por Malferma Socio kaj rikoltis favorajn recenzojn. La slovena prezidento Milan Kučan (vidu jun., p. 128) opiniis ĝin "vere interesa" kaj esperas "ke ĝi atingos pli vastan legantaron, aparte inter la junaj homoj". (K. Nekrep)

EPĈ adiaŭas – kaj daŭras

La lasta papera numero de *El Popola Ĉinio*, la 507-a de ĝia historio, aperis en decembro. EPĈ vivos plu en la reto (<http://www.chinareport.com.cn>), kun la avantaĝo de pli facila kaj rapida interkomunikado kun legantoj. Aliflanke, la revuo *La Mondo* (P.O. K. 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio; cel@china-report.com), organo de Ĉina E-Ligo, pliriĉiĝas de jan. 2001 per novaj rubrikaj.

Tra sovaĝa Kamĉatko


En 2000 ekzempleroj aperis *Pod dikoj Kamĉatke* ("Tra sovaĝa Kamĉatko"), vojaĝraporto de la svedo Sten Bergman el 1920-22 pri tiu plej orienta regiono siberia. Andris Natinj tradukis ĝin en la rusan el la esperantigo de Birger Gerdman (Stokholmo: Eldona E-Societo, 1932). La sama verko iam aperis ankaŭ en japana traduko.



Kelklinie

En oktobro la rumana magazino *Lumea* aperigis la tekston "La gravito-sistemo de lingvoj" de J.-L. Calvet, kiun Constantin Dominte tradukis el nia revuo (jun. '00, pp. 102-103)... Por la literatura revuo *Vsesvit* (n-ro 7/8) Viktor Pajuk ukrainigis la novelon *Trimova ŝakproblemo* de Eroŝenko.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia eĥo havo ne respondecas la redakcio. La donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonco. La tarifon de anoncoj vidu en la koloŝono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

SE VI VOLAS TROVI korespondanton en Brazilo, vendi aŭ sciigi ion al brazilaj esperantistoj, la plej rekta vojo estas senpage aperigi anoncon en la gazeto *Brazila Esperantisto*. Skribu al ni tuj. *Brazila Esperantisto*, Sekcio "Anoncetoj", Caixa Postal 03625, BR-70084-970 Brasília – DF, Brazilo.

LETERAMIKOJN DE ĈIE serĉas, por la Esperanto-kursanoj (de 14 ĝis 40 jaroj) de la lingvo-lernejo The Black Birds' Institute, Jerry Mbemba (DKEA, Rue Ngavula, 27, Kalamu [Yolo], Kinshasa, Resp. Dem. Kongo; jerryjackjr@hotmail.com), ties programestro. Ankaŭ Esperantaj libroj estas bonvenaj por la instituta biblioteko.

13-JARA KOMENCANTO ŝatas historion, paleontologion, komputilojn, vojaĝon, kaj esperas trovi amikojn tutmonde! Nikita Vasiljev, RU-601287 Vladimirskaĵa obl., Suzdaljskij r-n, turisticeskaja baza "Ladoga" 8-7, Ruslando.

INSTRUU LA FRANCAN KAJ E-ON en ĉina universitato! Instituto pri Fremdaj Lingvoj de la Univ. de Shandong serĉas frandlingvan instruiston por instrui la francan al ĉinaj studentoj de 12 feb. ĝis 15 jul. 2001 kaj eventuale de 1 sep. 2001 ĝis jan. 2002. Kapabla e-isto povos instrui ankaŭ E-on. Informas Vic-prof. Liu Xiaojun, Institut des langues étrangères de l'Université de Shandong, 27 hao str. Shan Da, CN-250100 Jinan, Shandong, Ĉinio; l.x.s@jn-public.sd.cninfo.net.

LASTMINUTE Gajninte egalan kvanton da voĉoj (po 3) en la voĉdono por "La Esperantisto de la jaro", kiun ekde 1998 aranĝas la revuo *La Ondo de Esperanto*, estis kunproklamitaj kiel "La esperantisto de la jaro 2000": Hans Bakker, Maŭro La Torre kaj Jouko Lindstedt.

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭkazajn servojn kaj publikigaĵojn.

Pionira vortaro por mondlingvo



KLARA VORTARO ESPERANTA-ARABA.
Georgeo Abraham. Rotterdam: UEA, 1998.
 308p. ISBN 92 9017 056 5. 22cm.
 Prezo: €13,70.

"Grava helpilo por komencantoj kaj progresintoj"
 (Hugh Martin)

La araba estis la sola oficiala lingvo de UN kiu ĝis nun malhavis ampleksan Esperanto-vortaron. Jen la unua paŝo por forigi tiun mankon.

Klara vortaro Esperanta-araba rezultas el pli ol 30-jara pionira laboro. Ĝi estas klara, ĉar ĝiaj 15000 kapvortoj estas plejparte aranĝitaj laŭ la alfabeto ordo de la vortoj anstataŭ tiu de la radikoj.

La redakcio kaj la Centra
 Oficejo bondeziras al vi
 okaze de la nova jaro 2001.

Femmetje BAKKER-KROON (1917-2000), iama vicdelegito en Bergen (Nederlando), forpasis antaŭ nelonge.



Abdul Ghaffar FALAK mortis lastatempe, je la aĝo de ĉirkaŭ 55 jaroj. En 1978, dum la tempo de ties fondiĝo, li gvidis Pakistanan Esperanto-Asociacion.

Ondrej HOFFMANN, kiu post la dua mondmilito metis la bazan ŝtonon de la E-movado en Liptovský Mikuláš (Slovakio) kaj ties regiono, mortis la 2-an de majo, 89-jara.

Hans HUNKELER (1920-2000), dumviva membro, iama delegito en Aarau (Svislando) kaj fakdelegito pri fervojoj, forpasis la 23-an de aŭgusto. Pli ol 25 jarojn li servis divers-postene, i.a. kiel prezidanto (1966-73), en Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj. Li estis LKK-revizoro de la 64-a UK (Lucerno, 1979).

Pia INCORONATO (1922-2000), instruistino, animo de la Esperanto-agado en sia urbo Ercolano (Italio), iama delegito pri arkeologio, forpasis la 10-an de julio.

Arnold JENSEN (1907-2000), antaŭe vicdelegito en Kopenhago dum duon-jarcento, membro de UEA seninterrompe dum sesdeko da jaroj, mortis antaŭ nelonge.

Margarita JOHNSTON DE BÖNDEL (1922-2000) delegito en El Bolsón (Patagonio, Argentino) forpasis lastatempe. Kun sia edzo Conrado ŝi fondis la lokan E-grupon.



Syed Sajjad Hussain MAJIDI (1929-2000), kiu estis la unua prezidanto de Pakistana Esperanto-Asocio, mortis la 9-an de novembro en Jhelum. Instruisto, li multfoje

aranĝis proprakoste naciajn kunsidojn en sia lernejo, kaj ebligis ke Muztar Abbasi, la fondinto de la pakistana Esperanto-movado, instruu tie la lingvon.

Jean-Jacques NOËL (1964-2000), delegito pri radio-amatorismo en Montmorillon (Francio), mortis antaŭ kelka tempo.



OKUMURA Rinzo (1912-2000), e-isto 70 jarojn, delegito pri instruado ekde 1956, mortis en Osaka (Japanio) la 18-an de aŭgusto. Li aktivis en la lerneja E-movado, verkis du hajkarojn (*Guto da roso*: 1980, 1996) kaj tradukis *Historiaj popol-rakontoj de Ikuno* (1990), *Distrajlegendoj de Hirano* (1992) kaj *Folkloroj de Kiŝiŝada* (1998). La leteron sur p. 8 de nia revuo li verkis kelkajn semajnojn antaŭ sia morto.

SATOO Ŝoiĉi (1937-2000), estrarano de Japania E-Instituto (1989-90, 97-), estro de la studeduka fako, komitatano A de UEA (1998-), antaŭa (1997-98) ĉefdelegito de Japanio, mortis la 3-an de oktobro en Morioka, kie li estis delegito kaj fakdelegito pri la instruado de la angla kaj Esperanto.

Kiel studento li lernis Esperanton ĉirkaŭ 1957 kaj baldaŭ fondis lokan E-klubon kun la nomo "La Ihatovaj Esperantistoj", laŭ fikcia loknomo de la fama verkisto MIYAZAWA Kenji, pri kies rilato al Esperanto li plurfoje prelegis. En 1995 fervoja firmao eĉ petis lian helpon por doni Esperantajn nomojn, laŭ verkmotivoj de tiu aŭtoro, al fervojstacioj. En 1990 Satoo iĝis universitata vicprofesoro (poste profesoro), kaj povis ekgvidi seminarion pri Esperanto — maloftaĵo en Japanio. Li ankoraŭ partoprenis la Tel-Avivan UK kaj, kun siaj studentoj, la IJK en Honkongo; tri semajnojn antaŭ la morto li prelegis en regiona E-kongreso.

Birger VIGGEN (1930-2000), delegito pri blindulaj aferoj, pereis en Stokholmo la 26-an de novembro en tragika akcidento. Li estis dum multaj jaroj estrarano de Sveda E-Federacio, membris en la LKK de la 65-a UK (1980, Stokholmo), plenumis diversajn funkciojn en Ligo Internacia de Blindaj E-istoj kaj en la sveda sekcio de Kristana E-Ligo Internacia. Nur du semajnojn pli frue li kunaranĝis la aŭtunan seminarion de Sveda E-Instituto en Lesjöfors kaj tiam iĝis prezidanto de la ekonomia societo Esperanto-Gården.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependery@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado, sporto): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ☐ esp.togo@cafe.tg.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ kalle@esperanto.se.

Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Huĝimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ tacuo@oomoto.or.jp.

Observanto de TEJO: d-ro Sjoerd G. Bosga, Trådragargatan 27 D, SE-72337 Västerås, Svedio; ☎ +46/21/417-045; ☐ sjoerd@esperanto.se.

Observanto de ILEI: s-ro Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd, Hungario; ☎ +36/23/364-198; ☐ Stefan.MacGill@galamb.net.

LOVRAN
28. 07 – 04.08.2001.
Kroatio



35-a ILEI-konferenco

“Dialogo al plifortigo de Esperanto-instruado
kaj Interkultura edukado”

marborde
sub verda monto Učka
en agrabla mezepoka urbeto

trankvila najbaro de pli fama kaj svarma Opatija,
atingebla ankaŭ promene laŭ romantika “lungo mare”

Venu ankaŭ vi !
... labori ... ripozi ... ekskursi ...

ne malfrui rezervi vian lokon en la dezirata kategorio!

Orbis pictus de Višnja Branković

Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste, Italio
☎/✉ +39 040 767 875; ✉ orbispictus@iol.it
<http://users.iol.it/orbispictus>

TEJNADO LA INTERNACIAN SINTENON

Eksperiment-seminario

Partoprenantoj serĉataj por soci-psikologia memspertgrupo,
inter 10-15 personoj el diversaj landoj. Laborlingvo Esperanto.
La tri-taga renkontiĝo kun tranoktado kaj nutraĵo, apud Balatono (HU),
estas senkosta. Okazadtempo: 23-25 marto 2001.
Interesatoj bonvolu kontakti por pluaj informoj:
☎/✉ +49-89-280788; ✉ eumacko@faxvia.net

**Fondaĵo
Canuto**

Multaj arde deziras membriĝi
en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via
donaco al Fondaĵo Canuto helpas
nin teni la kontaktojn kun tiuj
kiuj suferas pro transpagaj baroj.
Antaŭdankon pro via solidareco!

LA ONDO DE ESPERANTO

ĈIUMONATA SOCI-KULTURA REVUO KUN LITERATURA SUPLEMENTO JARFINE

- ▷ TRA ESPERANTUJO: Faktoj, problemoj, komentarioj
- ▷ CIVILIZO: Kia estis, estas kaj estos la mondo?
- ▷ ESPERANTO: lingvo, komunumo, literaturo
- ▷ Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj
- ▷ MOZAIKO: konkursoj, kvizoj, krucvortenigmoj, humuro
- ▷ Ĉiujara proklamo de la Esperantisto de la Jaro

Abonebla kontraŭ 24 eŭroj ĉe UEA kaj landaj perantoj.
Provekezemplero ĉe RU-620077 Jekaterinburg-77, p.k. 67, Ruslando

UNIKE VASTA PANORAMO



Unike vasta panoramo al la dilemoj de la nuntempa
mondo. Aperigante tiujn ĉi referaĵojn en Esperanto UEA
demonstris sian ligitecon al la streboj de Unesco pri
kulturo kaj prezentis al E-parolantoj legaĵojn kiuj helpas
meti la strebojn kaj celaron de la E-movado en pli vastan
kontekston. (Vilmos Benczik, *Esperanto* 1999:12)

KULTURO KAJ EVOLUO. Mervyn Claxton. Trad. Johano
Rapley. 1998. 60p. ISN 92 9017 59 X. 21cm. € 6,90.

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Andrew O. Urevbu. Trad.
Johano Rapley. 1997. 63p. ISBN 92 9017 053 0. 21cm.
€ 6,90.

KULTURO KAJ SANO. Mervyn Claxton. Trad. Helga
Rapley. 1999. 42p. ISBN 92 9017 060 3. 21cm. € 5,40.

Triona rabato por samtempa aĉeto de ĉiuj tri libretoj aŭ
de 3 ekz. de sama libreto. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Humphrey Tonkin,
Frank Nuessel, Mark Fettes.

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Individua abono: 50,80 eŭroj
Institucia abono: 118,90 eŭroj

Abonu pere de la Libroservo de UEA.


NOVAĴOJ

de la eldona fakto
de UEA


LERNOLIBRO EN LA ARABA

KURSO DE ESPERANTO, LINGVO INTERNACIA.
Georgo Abraham (1916). Rotterdam: UEA, 2000.
130p. ISBN 92 9017 071 9. 21cm. Prezo: € 6,90.

Manko de lernolibro por arablingvanoj estis grava bremsa al la disvastigo de Esperanto en la araba mondo. Ekde nun tiu agado povas disvolviĝi pli facile dank' al la nova lernolibro de Georgo Abraham, kiun UEA eldonis kadre de Kampanjo 2000. La lernolibro konsistas el tri partoj: 10-leciona kurso kun ekzercoj, legaĵaro, kaj konciza vortareto Esperanto-araba. La libro estis prespretigita de la Instituto Sabz Andishan en Irano, kiu kompostis ankaŭ la pli frue aperintan *Klara vortaro Esperanto-araba* de Abraham. Preparata estas ampleksa araba-Esperanta vortaro de la sama aŭtoro.



SUFERVOJO DE KNABINO



DE TAJGO AL MINARETOJ.
Aktorajo laŭ la taglibreto
de Ada Sikorska- Fighiera.
Jadwiga Gibczyńska.
Rotterdam: UEA, 2000.
18p. ISBN 92 9017 070 0.
21cm. Prezo: € 3,00.

Monodramo laŭ la taglibreto de la juna Ada Sikorska atestas pri kruelaĵoj de la dua mondmilito. Kiel 10-jarulino ŝi estis deportita al Siberio, de kie ŝi fine sukcesis reveni al Pollando tra Irano, Libano kaj Britio.

PRAGA MANIFESTO POR INFORMADO

PRAGA MANIFESTO DE LA
MOVADO POR LA INTERNACIA
LINGVO ESPERANTO.
Rotterdam: UEA, 2000.
19p. ISBN 92 9017 069 7.
21cm. Prezo: € 2,10.

La Praga Manifesto, subskribita de 14 000 esperantistoj, pruviĝis bonega informilo pri Esperanto. Tiu ĉi belaspekta kajero havas ĝian tekston, kun klariga enkonduko, en Esperanto kaj en la oficialaj lingvoj de UN (angla, araba, ĉina, franca, hispana, rusa).



KAJ PLIE...

LA STRATEGIO DE ESPERANTO EN LA NOVA JARMILO. Gian Carlo Fighiera. 24p. 21cm. Prezo: € 2,25.

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO 2000. Tel-Aviva prelegaro. Red. M. Lipari. 94p. 30cm. Prezo: € 7,80.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefono: +31 10 436 1044

Telefakso: +31 10 436 1751

Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>